

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
98-a jaro • n-ro 1179 (3) • **Marto 2005**

Dolchamar:

Per rokmuziko diskonigi Esperanton



**Klubestroj,
organiziĝu!**

**Esperanto
en Litovio**

**Figel pri
multlingvismo**

**Esperantisto
en la kosmo**

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎, ✉ +421 43 4222 788
✉ revuo@stonline.sk; revuo@esperanto.sk

Aperas:

ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voclegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 45); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,20.

Anoncarifto (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam (IBAN: NL24PSTB0000378964 SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam (IBAN: NL66ABNA0426051599 SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

☎+31-10-436-1044, ✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@inter.nl.net

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Vi trovos...



Enhavo

- 51 **MALFERME:** Klubestroj, organiziĝu! (Anatolo Gončarov).
52 Esperanto kaj Litovio (Petras Čeliauskas).
54 La esperantisto, kiu fine atingis la kosmon (Doron Modan).
56 Januara gazetara eĥo: Per rokmuziko diskonigi Esperanton (Marko Naoki Lins).
57 **KALENDARO**
60 Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo.
61 Komisionano Figel por Multlingvismo (David Ferguson).
62 Kiu kapablas interpreti? (Detlev Blanke). La aprila Malferma Tago. Koresponda Servo Mondskala en 2004.
63 **RECENZOJ:** Valentin Melnikov pri *Fajrejo*. Leif Nordenstorm pri *Enkonduko en budhismon* kaj *Kelkaj faktoj pri la budhismo*.
64 P.V. Ranganayakulu pri *Kompleksia medicino kaj saama akupunkturo*.
65 **LASTE APERIS.**
66 UEA tiras atenton de UN-Komisiono al lingvaj homaj rajtoj. LOKE.
67 **FAKE.** Terminologia Forumo en Vilno (Detlev Blanke). **PERSONE.** OFICIALA INFORMILO.
68 **TRA LA MONDO:** 5-a Monda Socia Forumo: Speciale por la junularo (César Dorneles Soarez kaj Marcelo Stoduto).
69 Sukceso en la skolta ĵamboreo (Roberto Resende). Aŭstralia Smerkursaro (Trevor Steele).
70 **ANONCETOJ.** La angulo de EVA: Nikolai Hohlov. **FORPASOJ.**

KOVRILPAĜE: La finna bando Dolchamar muzikas dancritman rokmuzikon, enmiksante influojn etnajn kaj regeajn, plus ete da slava melankolio. La aperon de ĝia nova albumo komentis ankaŭ la granda gazeto *Turun Sanomat*. Ĝi verkis muzikon en la suoma, sveda kaj angla lingvoj, sed aktuale la plej konvena alternativo sentigas Esperanto. *Ĝi malfermas diversajn eblojn uzi la imagon, diras la kantisto Patrik Austin. Kaj kompreneble plaĉas, ke ni havas vere internacian aŭskultantaron. Ni ricevas admiraĵon eĉ el Japanio kaj Ĉinio...* (legu pli sur la p. 56).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (ĝenerala planado, eksteraj rilatoj, informado): D-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎+39 06 957 57 13; ✉+39 06 957 66 33; ✉ renato.corsetti@esperanto.org.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio; ☎+352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala sekretario: s-ino Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, SE-135 42 Tyresö, Svedio; ☎+46 8 712 82 91; ✉ ulla.luin@esperanto.org.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Ans Bakker-Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎/✉+31 (0) 20 642 18 53; ✉ ans.bakker@esperanto.org.

Azia agado, Amikoj de Esperanto: S-ro Yu

Tao, P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio; ☎/✉+86 (0)10 68995946; ✉ yu-tao@china.com.

Faka kaj scienca agado: D-ro Amri Wandel, N-ro 767, IL-71908 Makabim, Israelo; ☎+972 (08) 926 44 62 (h); +972 (02) 658 68 60 (of); ✉+972 (02) 658 44 61; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

Landa kaj regiona agado: S-ino Maritza Gutiérrez Gonzales, Avellaneda 212, e/ Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana, Kubo; ☎+53 (7) 539201 (h); 401364 (of); ✉ 338729; ✉ mgglez@enet.cu.

Observanto de TEJO: S-ino Sonja Petrović.

Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.

Speciala komisiito pri informado: D-ro Jukka Pietiläinen, Auringonkatu 8 E 48, FI-02210 Espoo, Finnlando; ☎+358 (9) 8036149 (h); ☎/✉ (3) 215 7026 (of); ✉ jukka.p@esperanto.fi.

Malferme

Klubestroj, organiziĝu!

Anatolo Gončarov

Ekde kiam ekzistas la Esperanto-movado, ĝia ĉefa bazo estis kaj ĝis nun restas la Esperanto-kluboj. Ne subtaksante la rolon de multaj "neklubitaj" esperantistoj, ni konsciu, ke la ĉefa parola praktiko kaj organizita agado pasis tra la multnombraj kluboj. En la kluboj oni fariĝis konsciaj esperantistoj, pasigas interesajn horojn, seriozas kaj amuziĝas, enamiĝas kaj elamiĝas... Sed el la kluboj foriris ankaŭ miloj kaj miloj da silentaj kabeintoj.

Des pli ŝoke estas konstati, ke la organizita Esperanto-movado neniam serioze okupiĝis pri la kluba laboro. Preskaŭ ne estis seriozaj studoj kaj konferencoj, kie la klubestroj interŝanĝus spertojn. Sed gvidi la klubon, fari la programon alloga, ne perdi postkomencantojn estas veraj scienco kaj arto.

Jam pasis pli ol cent jaroj ekde kiam aperis niaj kluboj, sed ili laboras laŭ la samaj principoj kiel de komence, kiel en la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento. La tuta mondo ĉirkaŭ la kluboj jam komplete kelkfoje ŝanĝiĝis, sed ni kunsidas kaj sidadas laŭ la sama interparola skemo.

Estis pluraj esceptoj, kiam kluboj bone kaj harmonie funkciis, la klubanoj ne disperdiĝis, sed strebis veni al ĉiu vica kunveno. La sperto de tiuj kluboj restis surloka, anstataŭ esti prenita de la aliaj kluboj. Ĉiulande estas naciaj specifo influantaj la kluban laboron, tamen plejmulto el la kluba sperto estas esence la sama, sendepende de la lando aŭ kontinento.

Klarvidaj esperantistoj fojfoje levis la problemon de la stagnado de la kluba laboro, sed iliaj vokoj kaj rimarkoj ne estis subtenataj. La movado arde okupiĝas pri la disvastigado kaj tro malofte pri la kvalito.

Mi proponas du citaĵojn:

1) *La psiko de la hodiaŭa homo nepre nur escepte inklinas al idealisma, senegoismo kaj nenian profiton postulanta laboro, kia estas la pormovada. Ĝuste tia psiko, hodiaŭ ĉie renkontata kulpas, se ni tion povas titoli kulpo, pro la stagno en nia societa vivo, kio estas fenomeno internacia. Labori en societoj estas sendanka*



aktivado, ofte alportanta nur riproĉojn kaj neniam renommon. Pro tio mi ne malofte renkontas eldirojn de bonaj esperantistoj: "Ne plu mi volas okupiĝi pri la societa vivo. Mi verkos aŭ tradukos ion, kaj pri la societo zorgu aliaj...". Kursgvidado, agrabla atmosfero en societejoj, societaj kunvenoj, eĉ ne proponantaj altnivelan programon, tamen estas nepre necesaj ĝis la momento, kiam Esperanto estos oficiale agnoskita. Niaj societoj estas nia sola patrujo. Se ni perdos niajn societojn, ni perdos la bazon, sur kiu staras ĉio, kaj nia evoluinta literaturo estos majesta turo staranta sur aera fundamento. En la nuna stadio de la movado ni bezonas niajn societojn. ...

Norda Prismo, 1969, 1, p.4.
(evidente de la ĉefredaktoro, William Auld)

2) *Multilate Esperantujo tre similas al subevoluinta lando. En ĝi ekzistas tre klera elito kaj sufiĉe vasta publiko esperantlingve preskaŭ analfabeta. Kaj inter ambaŭ popoltavoloj mankas la perantoj: ne ekzistas minimuma instruado en la publikaj lernejoj kaj do la necesaj instruiloj... La elito rilatadas internaciskale, sed ĝenerale malmulte kun la popolo, kiu vivas en fermitaj rondetoj en pli kaj pli senesperaj situacioj.*

Literatura Foiro, 175 (okt. 1998), p.254.

(Claude Gacond)

Ni ĉesu strute malvidi la egan gravecon de la kluba laboro kaj ne esperu al UEA, SAT kaj aliaj E-organizaĵoj, kiuj havas aliajn ne malpli gravajn prioritatojn. La afero de la kluboj estas en la manoj de la klubestroj kaj klubaj aktivuloj mem.

Ekskursantaj membroj de la Esperanto-klubo en Munkeno



Kiel la unuan paŝon mi proponas organizi grupon de klubestroj, kiuj reeĥos al mia alvoko. Kiel la duan paŝon mi proponas konferencon de klubestroj, kie oni proponos formojn de organiziĝo, kunlaboro kaj fakte komencos la spert-interŝanĝon.

Sen pretendi ajnajn postenojn, mi estas preta fari la nulan preparlaboron: la ekkonsciajn samideanojn mi petas reeĥi.

anatolog@mail.ru

Esperanto kaj Litovio

Komence oni devus paroli pri la ligoj de Zamenhof mem kun Litovio. La fakto, ke li en 1907 dum akcepto en la Londona Guildhall nomis Litovion sia patrujo, pruvas nur lian nostalgion pri la tempoj, kiam lia naskiĝurbo Bjalistoko apartenis al Litova Granda Duklando; tiu eldiron ne rilatas al la nuntempa Litovio. Tamen lia vivo estis ankaŭ alimaniere ligita kun tiu lando.

En januaro 1885 Zamenhof finis Varsovia universitaton kaj ricevis la diplomon de kuracisto. Ricevinte inviton de la fratino Fani, li forveturis al la litova urbeto Veisiejai kaj komencis tie la kuracistan praktikon. Tie li havis pli da libera tempo por rekonstrui la neniigitan projekton de sia lingvo internacia kaj prepari por eldono la Unuan Libron de Esperanto.

Laŭ atesto de sia estinta dommastrino, li konsumadis dumsemajne po tri funtoj da vaksandeloj kaj multajn noktojn pasigadis kurbiginta ĉe skribotablo. Ne restas dubo, pri kio li estis tiel okupita tiutempe. Sed loĝante en malgranda urbeto Zamenhof ne povis eldoni sian libron, do post kvar monatoj li revenis en Varsovia. Tie li vane serĉadis eldoniston – neniu volis riski la monon por tia dubinda afero.

En 1887 Zamenhof konatiĝis kun Klara Zilbernik, kiam ŝi gastis ĉe sia fratino en Varsovia. Samjare en marto ili gefianĉiĝis. Klara loĝis en Kaŭno, kie ŝia patro posedis sap-fabriketon. La bopatro Aleksandro Zilbernik ne kontraŭis, ke duonon de la doto Ludoviko elspezu por la publikigo de sia libro. Tiu doto estis 10 mil rubloj, tiutempe granda sumo, egala al 7,742 kg da oro. Kontraŭ tiu mono Zamenhof povis eldoni la unuajn Esperantajn librojn kaj kovri la poŝtelspezojn de la abunda korespondado. Poste Zilbernik, malgraŭ la aĝo, mem ellernis Esperanton. Nun tiu Kaŭna strateto havas la nomon de L. Zamenhof. Kiam la Unua Libro aperis, Zamenhof komencis ricevadi leterojn de homoj, kiuj



Kunsido de la Loka Kongresa Komitato

ekinteresiĝis kaj eklernis Esperanton. En la jaro 1889 li eldonis la adresaron de la unua milo da esperantistoj. En tiu milo 54 adresoj estis el la nuntempa Litovio, 26 el Vilno. Al la nombro oni povas aldoni la pastron Aleksandras Dambraskas, kiu tiutempe estis ekzilita el Litovio kaj devis loĝi en Rusujo. A. Dambraskas en la listo estis la 186-a. Li verkis kaj en 1890 eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por litovoj.



Povilas Jegorovas

Ĝis la Unua Mondmilito en Vilno kaj Kaŭno agis Esperanto-societoj kaj aperadis la dulingva gazeto *Kovno-Esperanto*. Ĉi tiun periodon de la Litovia E-movado oni povas nomi la *rusa*, ĉar inter la esperantistoj estis nemultaj litovoj.

Post la mondmilito, en decembro 1919, fondiĝis Litova Esperanto-Asocio. Dekomence ĝia agado estis fruktodona: en 1921 estis ricevita la permeso organizi E-kursojn en la lando, en 1922 aperis la monata revuo *Litova Stelo*, samjare Esperanto estis enkondukita kiel nedeviga studobjekto en la Litova universitato. Post kelkajra malfluso la nova ondo leviĝis en 1934. Aperis kelkaj libroj, 12 lernolibroj, 2 vortaroj, Kaŭna radio disaŭdigis esperantlingvajn elsendojn. Bedaŭrinde venis la jaro 1940. Litovio estis aneksita de Sovetunio, kie la Esperanto-movado estis netolerata kaj persekutata. La vorto *Esperanto* fariĝis tabua ankaŭ en Litovio. La letargio daŭris 16 jarojn.

Post la morto de Stalin (en 1953) la klimato iomete mildiĝis. Al la reviviĝo de la Esperanto-movado helpis la 6-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj, okazinta

en 1957 en Moskvo. La partoprenontaj esperantistoj eldiris la deziron renkontiĝi kun la sovetaĵ samideanoj, do necesis urĝe fari esperantistojn kaj tiucele estis organizitaj kursoj, eldonitaj libroj kaj du vortaroj. En la kadro de la festivalo okazis dutaga kunveno de 250 esperantistoj el 26 landoj. En diversaj urboj de Sovetunio ekfunkciis kursoj de Esperanto kaj aperis artikoloj en la gazetaro.

Ankaŭ en litovaj gazetoj aperis artikoloj pri Esperanto. Aŭtune en 1956 organiziĝis la unuaj lingvostudaj rondetoj en Vilno kaj Kaŭno, poste ankaŭ en aliaj urboj. En 1959 estis eldonita ampleksa lernolibro kun krestomatia kaj vortareto. Samjare en Latvio apud Rigo estis organizita la unua Ĉebalta Esperanto-Tendaro. Poste la tendaroj nomiĝis Baltiaj (BET). Tiuj tendaroj okazadis laŭvice en Latvio, Litovio kaj Estonio. Ili fariĝis komunaj renkontiĝoj de Sovetiaj esperantistoj, kiuj ne rajtis veturi al Universala Kongreso.

Do tiuj BET-oj estis kvazaŭ mini-kongresoj kaj en ili kolektiĝadis po 200-400 personoj. La tradicio vivas, pasintjare en Litovio okazis jam la 40-a BET. En multaj urboj organiziĝis kaj aktivis Esperanto-kluboj. Menciindas la Vilna junulara klubo "Juneco", naskiĝinta en 1961. La klubo funkcias ĝis nun.

Esperanto povis esti instruata fakultative en mezlernejoj kaj en 1972 en Panevėžys okazis la unua "kunflugo" de lernantoj-esperantistoj, en kiu partoprenis preskaŭ 200 gelernantoj el 32 lernejoj. Tamen la reago de la centra komitato de la komunista partio estis ege negativa, ĉar la arango okazis sen ĝia aprobo. Estis ordonite ĉesigi la fakultativan instruadon kaj diversmaniere bremsi la E-movadon. En la gazetaro aperis kontraŭ-Esperantaj artikoloj. Pro malhelpo de oficialaj instancoj kelkajn jarojn ne povis okazi tradiciaj BET-oj. Kiam finfine en 1976 en Viekšniai oni organizis BET-17 kaj jam kolektiĝis la partoprenantoj, el Vilno venis postulo ne malfermi la tendaron. Kontraŭ tio ekprotestis la venintaj rusaj esperantistoj, inter kiuj estis partianoj kaj veteranoj de la milito, minacante plendi al Moskvo, se la tendaro estos dispelita. Kaj la Vilnaja marionetoj cedis. La 17-a BET estis savita, kvankam direktoro de la profesia lernejo, disponiginta la ejojn, perdis sian postenon.

Praktike dum la soveta periodo ne estis ebla la eldonado de Esperanta literaturo, tial oni uzis multobligitajn tajpaĵojn, t.n. samizdatojn. Iam oni nomas ilin eksterencenzuraj, sed tiu difino ne estas ĝusta. Jes, ilin ne kontrolis la ŝtata

cenzo, sed tion faris la eldonantoj mem, eĉ pli severe, komprenante la eblajn postsekvojn. Persekuti la memeldonaĵojn oni povis nur pro ne laŭleĝa uzado de multobliga tekniko. Necesis menci la plej meritajn aktivulojn de tiu tempo: Adomas Vaitilavičius (Vilnius), Albinas Vebeliūnas (Kaunas), Telesforas Lukoševičius (Panevėžys), Antanas Mekys, la aŭtoro kaj multobliganto de multaj E-lernolibroj.

Finfine en 1979 estis permesite fondi la organizaĵon - Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) kun filioj en la respublikoj. Sed ĉekape de la organizo estis starigita homo, ne-esperantisto, zorganta ne pri disvastigo de la lingvo, sed pri ĝia bremsado.

En decembro 1988 la litova filio decidis apartiĝi de ASE kaj refondi la antaŭmilitan Litovan Esperanto-Asocion, kiu jam en 1989 aliĝis al UEA. Sekvontjare ankaŭ Litovio

proklamis la rekreon de la sendependa ŝtato. En 1991 reaperis la dumonata revuo *Litova Stelo* kaj ĝi jam 14 jarojn brilas sur la Esperanta firmamento.

Al la Asocio en 1992 estis transdonita la iama domo de A. Zilbernik en Kaŭno, kie nun troviĝas la oficejo de LitEA, la redakcio de *Litova Stelo*, la riĉa biblioteko kun pli ol 4000 libroj, la kunvenejoj kaj la kursejoj. Ĉi tie regule okazas senpagaj E-kursoj, gvidataj de spertaj instruistoj. En la jaro 2001 la farita tutlanda popolnombrado trovis en Litovio 858 personojn indikintajn, ke ili scias Esperanton, kiu okupas la 16-an lokon inter la fremdlingvoj. Filio de LitEA fondiĝis ankaŭ en la ĉefurbo Vilno. Ekde la jaro 1991 delegacioj de litovaj esperantistoj partoprenas en ĉiuj Universala Kongresoj de Esperanto. Iomete reduktiĝis la rolo de lokaj kluboj, ĉar nun unuopaj homoj povas senbare

uzi personajn kontaktojn kaj libere vojaĝi tra la mondo. La nuntempa "spirito" de la E-movado en Litovio sendube estas la prezidanto de la Asocio Povilas Jegorovas.

Precipe fruktodona estas la eldona agado: dum la lastaj jaroj aperis 10 lernolibroj de la lingvo internacia, multaj informaj eldonaĵoj por turistoj pri Litovio, Vilno kaj aliaj urboj, ankaŭ abunda litovlingva literaturo pri Esperanto. Per tio oni celas prepari la litovan socion al la venonta 90-a UK, ke ĝi pli profunde ekkonu la esencon kaj sencon de la Esperanto-movado, ke post la kongreso ĝi ne estu tuj forgesita, sed metu firmam bazon por la estonta pli kvalita kaj profunda movado en la lando. **Petras Čeliaskauskas**



Inaŭguro de monumento en Veisiejai



Zamenhof kun la edzino Klara



Antaŭ la domo de Zilbernik en Kaŭno



Gejunuloj dum ekskurso



E-kurso en Vilno



La kursgvidanto Gediminas Degesys



Junaj litovaj esperantistoj

La esperantisto, kiu fine atingis la kosmon

La 27-an de januaro pasis 60 jaroj de la liberigo de la koncentrejo Aŭŝvico. Unu el ĝiaj viktimoj estis la knabo Petr Ginz, kies mallonga vivhistorio tute skulis mian animon, dum neatendita esploro por la de mi redaktata *Israella Esperantisto*.

Antaŭ kelkaj monatoj mi interesiĝis pri eminentaj esperantistaj figuroj el Israelo por iam verkota libro. Mi hazarde decidis komenci per Ota Ginz, intervjuante s-anon Jehoŝua Tilleman, kiu konis lin persone. Ginz (1896-1976), mondkonata esperantisto ankoraŭ en Ĉeĥio, estis eminenta eksperto pri lingvaj demandoj, kunredaktoro de *Ĉeĥoslovaka Antologio* kaj aŭtoro de *Radio-amatora vortaro kvinlingva*. Li multe tradukis, interalie, ĉeĥen el Esperanto la libron *Fine mi komprenas la radion*. Danke al lia iniciato, tiu libro estis plutradukita en 28 lingvojn! Enmigrinte Israelon li loĝis en Kirjat-Jam, kie li elhebreigis la romanon de Reuven Kritz *Freŝa Mateno*.

Unu tagon, serĉante interrete la nomon Ota Ginz, mi trovis esperantlingvan retejon kie aperis la nomo Petr Ginz, kun unusola frazo: *Petr Ginz, filo de Ota Ginz, deportita kiel 16-jara, pereis en nazia koncentrejo*.

Strange, mi pensis. Neniu el miaj intervjuitoj sciis rakonti, ke Ota Ginz havis iam filon, kiu pereis en la Holokaŭsto. Verŝajne Ota malemis rakonti pri sia persona tragedio eĉ al siaj plej proksimaj kolegoj. Serĉinte pagojn enhavantajn la vortojn *Ota Ginz*, mi trovis 40 retejojn. Sed provante nun la samon per la vortoj *Petr Ginz*, kaj kun la varianto *Peter Ginz*, mi apenaŭ povis kredi: troviĝis sume 2094 retaj paĝoj! Kvankam tio ŝajnis komplete malebla, aperis multegaj informoj ĝuste pri la filo de Ota Ginz, Petr. Tekstoj en amaso da lingvoj, tuŝantaj jen iun sekretan gazeton, jen Esperanton, jen vojaĝon de la kosmoŝipo *Columbia*, jen la getton

Terezin, poemojn, romanon, kaj ĉie, ĉie, belegajn desegnaĵojn.

Petr Ginz naskiĝis en 1928 en Prago en juda esperantista familio, al la gepatroj Ota kaj Mirjam Ginz, kiuj konatiĝis en Esperanto-Kongreso. Ankaŭ aliaj familianoj de ambaŭ geedzoj estis esperantistoj. Mirjam (antaŭe Marie) judiĝis, kaj lernis gvidi la judan hejmon de sia bopatrino. La Internacia Lingvo estis parolata inter la gepatroj de mateno ĝis nokto, kaj Petr kaj lia pli juna frato Hava plene ensorbis ĝin, kvankam alparolataj ĉeĥe.

Petr, sentema kaj verva knabo, elmontris jam kiel etulo elstarajn talentojn pri pentrado kaj verkado. En 1940 la germanoj okupis Ĉeĥoslovakion, kaj en 1942, kiel 14-jarulo, Petr estis malliberigita en la getto Terezin (Theresienstadt), 60 kilometrojn norde de Prago. Li alvenis al la getto sen la gepatroj, kiuj estis protektataj, estante laŭ la nazia difino *miksita paro*. Petr loĝis en la getto en junulejo de 350 ĉeĥparolantaj knaboj en la aĝo 11-17.

En la junulejo estis eldonata sekreta, malpermesita junulara gazeto en la ĉeĥa, nomita *Vedem* (Ni gvidas). Petr surpris sur sin la taskojn de la redaktado kaj desegnado. Fojfoje, por kuraĝigi verkadon de artikoloj, la juna redaktoro pagadis al la verkantoj per manĝaĵoj, kiujn li ricevis en pakajoj de siaj gepatroj.

En *Vedem* aperis poemoj kaj anoncoj pri la agado de la semajno, flanke de raportaĵoj pri la malgaja realo de Terezin, kiel pri maljunuloj serĉantaj manĝorestaĵojn en rubujoj, aŭ pri la teruro de deportado al la "oriento".

La gazeto vivis ekde julio 1942 ĝis septembro 1944, kaj ampleksis entute



Petr Ginz

pli ol 800 pagojn. Ĝi elstaris en sia alta literatura nivelo, ĉefe dank' al la alta intelekta kaj humanisma nivelo de ties redaktoro, al kiu multaj profetis gloran estontecon pri arto. *Vedem* plene konserviĝis, kaj ĝi servas kiel unika dokumento pri la interna mondo de la junularo en la Holokaŭsto.

Same kiel la aliaj loĝantoj de la getto, ankaŭ Petr devis lukti kun la ĉiutaga malhela realo kaj kun la ĉiama minaco de la deportado al la morto-koncentrejoj. La verkado kaj desegnado helpis al la talenta knabo kroi per la imago trans la getton kaj navigi en aliaj sferoj. Ne hazarde la redaktoro priskribis sian gazeton kiel kanonon, kies armilo estas satiro kaj humuro, kaj kiu pafas aerostaton en la ĉielon.

Kaj tiel, frapite de sopirego al la vidaĵoj de sia infaneco, revenas Petr al la bela Prago: *Jaro, preskaŭ jaro pasis, kaj anstataŭ via beleco al mi restis nur malmultaj stratoj. Preskaŭ jaron sidas mi en karcero, kiel sovaĝa animalo en kaĝo.*

Pli ol ion alian, la junulo amis navigi per sia imago sur la maroj, kiel ŝipa kapitano. Tiu ĉi motivo ripetigis multfoje en liaj desegnaĵoj el la getto. Sed ne nur trans la getton kaj sur la maroj li navigis, sed eĉ ekster la terglobo: jam estante 12-jaraĝa li

desegnis krajone sian *Vidaĵon de la Luno*. En la desegnaĵo videblas, super la haosa montaro de la Luno, la eta kaj serena terglobo, kiel ĝi aspektas de sur la Luno. Ĉu Petr imagis, ke nur sur la Luno li trovos pacon kaj trankvilon, sen persekutado kaj timo?

En septembro 1944 Petr estis deportita al Aŭŝvico kaj pereis en gaskamero. Lia fratino Hava, kiu alvenis al Terezin jaron kaj duonon post sia frato, kaj la patro Ota, kiu alvenis tien en februaro 1945, ambaŭ restis en la getto ĝis la liberigo.

58 jarojn post la perejo de Petr Ginz, en januaro 2003, la israela astronauto Ilan Ramon vojaĝis al la kosmo kun la usona stabo de la kosmoŝipo *Columbia*. Mirinda koincido estas, ke Ilan Ramon estis kuzo de Jehoŝua Tilleman, la esperantisto kiun mi unue intervjuis pri Ota Ginz, la patro de Petr.



La astronauto Ramon ŝvebas en la kosmoŝipo

Ramon, 48-jara kolonelo en la Israela aerarmeo, deziris preni kun si al la kosmo simolan objekton ligitan al la Holokaŭsto, estante israelano, kies patrino kaj avino saviĝis de Aŭŝvico kaj parto de kies familianoj pereis en la Holokaŭsto. Li turnis sin al la muzeo pri la Holokaŭsto Jad Vaŝem, kaj de ilia kolekto elektis la desegnaĵon de Petr Ginz *Vidaĵo de la Luno*. Li diris: *Mi sentas ke mia vojaĝo realigas la revon de Petr je distanco de 58 jaroj. La fakto ke li pereis en la krematorioj de Aŭŝvico atestas pri lia fizika neniĝo. Liaj verkoj atestas pri la venko de l' spirito. Venko de junulo kun multifaceta talento, kiu sukcesis elterigi trans la realo de la getto en kiu li estis malliberigita, per siaj imago kaj talento.*

Fine de la sukcesa vojaĝo, 11 minutojn antaŭ la atendita surterigo, *Columbia* kraŝis kaj falis de alteco de 60 kilometroj. Tio okazis la 1-an de februaro, en la naskiĝtago de Petr. Tiam li estus precize 75-jara, se li vivus.

De la familio Ginz restis hodiaŭ nur Hava. Kiel ŝia frato, ankaŭ Hava estas artisto. Ŝi pentras laŭ profunda influo de siaj knabinaj travivaĵoj dum la Holokaŭsto. Ŝi loĝas en la prospera endezerta urbeto Omer, kaj uzas por sia arto materialojn kiujn ŝi produktas el la dezertaj kreskaĵoj kaj grundo.

Kiam mi kontaktis ŝin, Hava Presburger-Ginz, kiel ŝi hodiaŭ nomiĝas, salutis min en Esperanto, sed sentis sin pli komforte daŭrigante hebree. Tamen dum nia posta reta korespondado ŝi skribis en tre klara Esperanto, sed en lingvaĵo de iu, kiu jam jardekojn ne aŭdis la hejman lingvon.

S-ino Presburger-Ginz rakontis al mi pri tio, ke Esperanto servis ĉe ili, krom kiel parolata lingvo inter la gepatroj, ankaŭ kiel sekreta lingvo de la tuta familio, inkluzive la gefilojn, kiam ili ne deziris ke oni komprenu ilin. Esperantistoj el la tuta mondo gastis ĉe ili.

Je la demando, kiu el la gefratoj scipovis E-on pli bone, ŝi respondis: *Ŝajnas al mi ke Petr kaj mi scipovis la lingvon samnivele. Sed poste venis surpriza aldono: Petr provis kompili en la getto Esperantan-ĉeĥan vortaron laŭ la memoro. Tremvoĉe mi demandis: Ĉu ĝi ekzistas ie? – Du paĝoj el ĝi saviĝis, kaj mia patro donacis ilin antaŭ sia morto al Jad Vaŝem.*

Hava estis vojaĝonta al Prago por sia ekspozicio, kaj ni decidis renkontiĝi post ŝia reveno. Mi vojaĝis al Jerusalemo, al Jad Vaŝem, por vidi la vortaron. Oni enmanigis al mi fotokopiitan broŝuritan libron kun la etikedo *Petr Ginz – por esploristoj*. Laŭdire, neniu havas aliron al originalaj dosieroj, sed mi tamen insistis rigardi la originalan dosieron Ginz, prezentante min kiel la redaktoron de *Israella Esperantisto*. Post longa interkonsultado venis oficiala permeso, ke mi rigardu la originalaĵojn, sub

proksima inspektado de la oficistino, kiu diris, ke tiaĵo neniam okazis. Kiam mi tenis la fragmentojn el la vortaro, mi povis nur admiri la knabon kiu en tiaj kondiĉoj okupiĝis pri tia tasko.

Reveninte el Ĉeĥio, akceptis min Hava Presburger-Ginz tre afable en Omer, kaj montris al mi interalie la taglibrojn de ŝia frato kaj lian originalan sciencfikcian romanon, propramane desegnitajn kaj binditajn, en kiu ŝi vidas kontraŭ-hitleran kritikon. El la havaĵo de la patro Ota, ŝi montris al mi interalie poŝtkarton el la dua UK, kun originalaj subskriboj de D-ro Zamenhof kaj aliaj eminentuloj.

Demando: *Vedem* kaj aliaj heroecaj kulturaj entreprenoj estis eco de la getto Terezin. La historia literaturo pri tiu ĉi getto substrekas ilin, tiel ke la publiko ne multon scias pri la malfacila vivo en la getto. Kion vi povas rakonti pri tio?

Mi estis en Terezin dum unu jaro, kaj dum jaro mi estis malsata. La infanoj sukcesis tamen plejparte supervivi dum ili estis ankoraŭ en la getto. Tio okazis, ĉar la judoj tiel dividis la limigitajn manĝaĵojn, ke la infanoj, kaj tiuj kiuj laboris, ricevis pli ol la maljunuloj. Tial mi vidis fojfoje, ke maljunuloj kverelas super ŝeloj de terpomoj.

Kiel povas esti, ke ni, esperantistoj, sciiis nenion pri via frato?

Ni neniam parolis pri Petr eĉ ene de nia familio. Tro doloriga la afero estis.

Aŭdinte tion, mi rememoris la vortojn de la patrino Mirjam jam en 1972: "Kiam mi ekaŭdis de amikoj – sur la strato en Prago – ke Petr estis deportita, mi svenis surloke. Mi sentis ke io terura okazis. Ni provas ne pensi pri tio, ne memori, por ke ni povu entute vivi."



La desegnaĵo "Vidaĵo el la Luno"



La familio Ginz



La familio en Prago, 1938




La gazeto Vedem



El la taglibro



Du paĝoj el la vortaro de Petr



La poŝtmarko



La eldonita taglibro

Per rokmuziko diskonigi Esperanton

International Herald Tribune (27 jan) raportis pri la juda ĉeĥa knabo Petr Ginz, kiu pereis 14-jaraĝa en koncentrejo (legu pli sur la p. 54-56). Pri Petr aperis ankaŭ longa kontribuo en *Israela Esperantisto* (12/2004). Tre probable pro la kontakto kun Modan, la fratino rakontis dum intervjuo al la ĵurnalisto de *International Herald Tribune* ankaŭ pri la Esperanto-vortaro, certas Josef Semer, prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo.

La kutiman antaŭjuĝon ke Esperanto ne estas kultur-produkta lingvo brile refutas la finna rokbando Dolchamar per sia nova albumo *Rebela sono*, kies lanĉon krom la finna kulturgazetaro komentis ankaŭ la granda gazeto *Turun Sanomat* (12 jan): Ili muzikas dancritman rokmuzikon, enmiksante influojn etnajn kaj regeajn plus ete da slava melankolio. La kantoj rakontas pri la vivo inter la aktualaj renversigegoj. La kerno de la mesaĝo de la tekstoj estas tio, ke kune oni povas ion ajn.

Mi ja antaŭe verkis muzikon per la suoma, sveda kaj angla lingvoj, sed aktuale la plej konvena alternativo sentiĝas Esperanto. Esperanto estas krea lingvo kaj funkcias alimaniere. Ĝi malfermas diversajn eblojn uzi la imagon, diras la kantisto Patrik Austin. Kaj kompreneble plaĉas, ke ni havas vere internacian aŭskultantaron. Ni ricevas admirpoŝton eĉ el Japanio kaj Ĉinio.

Teksasa sindikato ofertas unikan lingvan sperton, asertas titolo en la usona gazeto *The Daily Texan* (28 jan). Tiuj, kiuj emas lerni alian lingvon, sed ne estas entuziasmaj pri la ideo

pasigi jarojn en lernejo, povas resti trankvilaj, plul egeblas en la artikolo. Ĉar la solvo estas komenci Esperanton – la internacian lingvon, en kurso ofertita de teksasaj esperantistoj. La teksasa urbo Austin gastigos la nordamerikan Esperanto-kongreson ĉi-junie. Kvin monatoj estas multe da tempo por atingi nivelon je kiu vi povas babilu kun aliaj parolantoj, diras loka esperantisto. Simple eleganta, belsona lingvo.

Esperanto: potencaj mal-amikoj kaj tro malmulte da amikoj, titolas *Eindhovens Dagblad* (15 jan) kaj prezentas la libron de la lingvisto Marc van Oostendorp pri la historio de Esperanto. Li klarigas ke la granda danĝero kiu minacas aron de idealistoj, nome kverelo kaj disiĝo, ankaŭ ne lasas netuŝita la Esperanto-movadon. Krome oni povas bone paroli la saman lingvon, sed tio ne nepre signifas, ke vi ĝin uzas en sama maniero. Japano kaj Nederlandano esprimas sin en alia maniero kaj interpretas la konduton de alia ankaŭ diversmaniere. Laŭ Van Oostendorp la

amara ironio de Esperanto estas, ke ĝi en sia historio ne havis sufiĉe da geamikoj por vere sukcesi, sed ĝi havis certe la ĝustajn malamikojn, nome Hitler kaj Stalin.

La menciitaj kaj pliaj artikoloj estas troveblaj ĉe: <http://lingvo.org/gazetaro> (pasvorto: saluton). Bedaŭrinde ni ne sukcesas trovi ĉiujn Esperanto-menciojn. Se vi legas pri Esperanto en la gazetaro, bonvolu sciigi al ni. Ni sciigos al la

Marko Naoki Lins komunikadcentro@lingvo.org

La finna rokbando Dolchamar



La aŭtoro ĉe Hava Presburger-Ginz

Nun la fratino Hava ĉesigis la familian silentadon. De post la kosmoŝipa vojaĝo kun la desegnaĵo de Petr ŝi intervjuigas tutmonde. Eble ŝia esperantista anima kordo estis restreĉita post nia renkontiĝo, ĉar ŝajne la unuan fojon ŝi menciis la Esperantan vortaron de Petr en intervjuo, aperinta en *International Herald Tribune*, la 27-an de januaro.

Antaŭ nelonge malkovriĝis en Praga mansardo taglibro de Petr. La 8-an de februaro Hava eldonis ĝin en Prago. Nun esperantlingva eldono estas prilaborata de Petro Chrdle. En januaro aperis en Ĉeĥio poŝtmarko memore al Petr kaj al la kosmoŝipo *Columbia*. La 27-an de januaro la asteroido 50413 alinomiĝis al Petr Ginz. Ĝi troviĝas inter la planedoj Jupitero kaj Marso, kaj ĝi ĉirkaŭas la Sunon ĉiun kvaran jaron kaj duonon. Finiĝis la vojaĝo de Petr al la kosmo.

Doron Modan



Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fideindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la julia numero.

marto

03-06: 5-a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio en Havano. La temo: *Esperanto: Realo kaj estonteco*. ☎ Kuba Esperanto-Asocio, ☎ keasp@enet.cu; www.esiss.cc/cu/esperanto/jajabokubo.htm.

04-06: Kapeĝu Renkontiĝo kun esperantistoj movademaj kaj nemovademaj en Mataró, Katalunio. *Lerni ludante, kanti kaj festumi*. ☎ +34625469373, ☎ f.macip@esperanto-ct.org; www.esperanto-ct.org/material/aligxiomataro.pdf.

05: Mezlanda Esperanto-Tago en Wedgwood. ☎ +44-(0)1782-372105 aŭ 373427, ☎ +44-(0)1782-372393, ☎ wedgwood.college@staffordshire.gov.uk.



05-06: Fakkursoj pri alternativa vivmaniero en Herzberg / Harz, Germanio. ☎ ICH, Interkultura Centro Herzberg (Kulturcentro de UEA), DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. ☎ +49(0)5521-5983, ☎ esperanto-zentrum@web.de; <http://ich.sytes.net/index.html>.

07-11: Kosmologio de Martinus en Herzberg / Harz, Germanio. ☎ ICH (v. 05 mar).

08-10: Konsultiĝo por gvidantoj de Esperanto-domoj, -centroj, -bibliotekoj kaj -arkivejoj en la E-Domo en Herzberg, Germanio. ☎ ICH (v. 05 mar).

18-20: Pedagogiaj Seminarioj en Herzberg / Harz, Germanio. Temo: leksikografio, gramatiko, literaturo. ☎ ICH (v. 05 mar).

20-23: Antaŭfestivalo en Venecio, kadre de la 29-a IJF. ☎ <http://iej.esperanto.it/ijf2005> (v. 23 mar).



21-28: 21-a Printempa Semajno Internacia (paska renkontiĝo por la tuta familio) en Mücke, Germanio (meza Heslando). ☎ Germana Esperanto-Asocio, Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanio. ☎ +49-(0)2641-4885, ☎ +49-(0)9786-66 (oficejo), ☎ psi@esperanto.de; <http://www.esperanto.de/psi/>.

22 mar - 03 apr: Esperanto-vizito en Irano. ☎ Internacia Klubo Esperantotur, Str. M.Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. ☎ +48,52,3461151, ☎ info@esperanto-turismo.com.



23-29: 29-a Internacia Junulara Festivalo, ĉemare en Lido di Jesolo apud Venecio, Italio. ☎ Itala E-Junularo, Via Villorosi, 38, IT-20143 Milano, Italio. ☎ +39-02-58-100857, ☎ iej@esperanto.it; <http://www.esperanto.it/iej/>.

25-28: 23-a Studadesio en Herzberg / Harz. ☎ ICH (v. 05 mar).

Boulogne 2005

25-30: Boulogne 2005. Esperanto-Memorifesto okaze de la centjariĝo de la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905 en Boulogne-sur-Mer, Francio. ☎ boulogne2005@online.fr; <http://boulogne2005.online.fr/eol>.

25 mar-04 apr: Vizito en ses eŭropaj ĉefurboj kaj en la kongreso en Bulonjo ĉe maro. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

30 mar-02 apr: Aprilaj Ridetoj, humura festo de Odesa junulara E-klubo Verdaĵo. ☎ <http://odesa.iatp.org.ua/esperanto/1>.

30 mar - 13 apr: Vizito en Irano. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

aprilo

08-10: Esperanto-Domoj, bibliotekoj, arkivoj (konsultiĝo por fakuloj). ☎ ICH (v. 05 mar).

08-10: Festivalo/Kongreso en Bourg en Bresse (Francio) okaze de la 100-jariĝo de la klubo. Temo: *Internaciaj Renkontoj kaj Solidarecoj*. Koncertoj de Duobla Unu kaj Kajto. ☎ michel.fontaine13@wanadoo.fr.

11-17: Semajna lingva seminario en Ĉeĥa Paradizo en vilaĝeto Skokovy, kun asocio de handikapitaj esperantistoj. ☎ Jindřiška Drahotová, ☎ drahotovaesperanto@seznam.cz.

15-17: 57-a Regiona Staĝo de Esperanto en Lucelle en la sudo de Alzaco ĉe la svisa landlimo. Riĉa programo kun koncerto de JoMo kaj prelegoj de Ed Borsboom. ☎ André Grossmann, 5 rue de la Pyrénées, FR-38390 Baldersheim, Francio. ☎ sudrejna.kuriero@free.fr.

22-24: Esperanto-renkontiĝo de Bavara Esperanto-Ligo (BELO) *Esperanto en nova Eŭropo* en Forchheim, Germanio. ☎ Evelin Geist, Kasernstr. 19, DE-91301 Forchheim, Germanio. ☎ +49-(0)9191-15218, ☎ +49-(0)9191-729507.

23: Malferma Tago en la CO de UEA kun Balduŝ Ragnarsson (10:00-17:00). Bazono de E-ajoj, senpagat loterio, kafo kaj teo, specialaj oferto kaj rabato de 10% en la libroservo.

23-24: Enkonduko al lingva ekonomiko kun D-ro

Michele Gazzola en La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☎ Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☎ +41-32-9267407, ☎ kce.esperanto@bluewin.ch.



23-30: Internacia Infan-semajno en kastelo Grezjono, Francio. ☎ Elisabeth Barbay, 25, allée Gabriel Fauré, FR-93140 Bondy, Francio. ☎ +33-(0)1 48 47 23 87.

23apr-03maj: 30-aj Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kun Generala kunveno de Internacia Klubo "Esperantotur" (2005-04-24), Internacia kurso por E-vojaĝgvidantoj kaj 27-a Internacia Akademio Kandidatiĝo por Bakalaŭriĝo-Sesio kaj Internacia Kurso por E-vojaĝgvidantoj. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

24: Esperanto-Meso en la katedralo de Speyer, Germanio, je la 15-a horo.

25-29: Kino-semajno de Esperantaj videofilmoj en ICH (projekciado de elektitaj video- aŭ DVD-filmoj) en Herzberg / Harz. ☎ ICH (v. 05 mar).

29-30: Esperanto por komencantoj. Intensa semajnfina Esperanto-kurso ĉe la VHS Düsseldorf, Germanio. ☎ Harald Schmitz: herschmitzpu@gmx.de.

29 apr-01 maj: Biblia Sabat-Dimanĉo: Diservoj, kantoj, bibliaj tekstoj, en Kapuziner-Begegnungshaus St. Fidelis, DE-Zell am Harmersbach, Kinzigtal (Sud-Germanio). ☎ Bernhard.Eichkom@esperanto.de.

29 apr-02 maj: Rusia Esperanto-Kongreso en la ripozejo "Bodrostj" en Jakaterinburg. ☎ Raja kaj Viktor Kudrjavcev, a/ja 132, RU-620041 Jakaterinburg, Rusio. ☎ (343) 3814250, ☎ kokolija@mail.ru; <http://rek-eola-2005.narod.ru/>; Rusia Esperantista Unio, P.f.57, RU-105318 Moskva, Rusio. ☎ esperanto@reu.da.ru.

majo



01-09: Aroma Jalta: La 17-a E-Festivalo en Jalta, Krimeo. Vladimir Hordijenko, p.k.35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. ☎ +38-044-2951701, ☎ voldimir_h@ukr.net; <http://www.aromajalta.by.ru>.

02-05: Kunveno ĉe la Turo de Princo Teng en Nanchang, Jiangxi, Ĉinio. La temo: *E-aplikado kaj E-movado*. ☎ Jiangxi-a Esperanto-Asocio, Nanchang-a E-asocio, Hong du nan da dao 270 hao,

6 dong 3-3-B shi, Nanchang CN-330002 Jiangxi, Ĉinio. ☎/+86-791-8219059, ☎/+86-791-8340704, ☎/0138 0350 2467, ☎/caopinaro@163.com aŭ venkon@nc.jx.cn.

02-05: EoLa-17, arta festivalo Esperanto – Lingvo Arta, en Tjumenj. ☎ Rusia Esperantista Unio, P.f. 57, RU-105318 Moskva, Rusio. ☎/esperanto@reu.da.ru; kokolija@mail.ru; http://rek-eola-2005.narod.ru.



03-05: Volontula Semajno en ICH (ordigado, arkivigaj laboroj en biblioteko, ktp.). ☎ ICH (v. 05 mar).

04-08: Berlina Arbara Renkontiĝo en Bad Münden, inter Hannover kaj Hameln, Germanio. Por homoj kiuj estas aŭ sentas sin junaj. En arbaro, ideala por familioj kun etaj infanoj. ☎ Andi Münchow, Oberstr. 15, DE-30167 Hannover, Germanio. ☎/DLSoap@gmx.de; http://www.krokodilo.de/baro/baro.php.

05-08: 82-a Germana Esperanto-Kongreso en Michelstadt/ Odenwald (Heslando). ☎ Germana Esperanto-Asocio, Immenttalstr. 3, DE-79104 Freiburg, Germanio. ☎/+49-761-289299. ☎/gea@esperanto.de; http://www.esperanto.de/gek.



07 - 14: 57-a IFEF-Kongreso en Braşov, Rumanio. ☎ 57-a IFEF-Kongreso, OP 1, CP 71, Braşov, Rumanio. ☎/rodica.todor@pcnet.ro; http://57-ifef.rdsbv.ro.

13-15: SATEB-Semajnfino en Barlastono, Britio. Gastpreleganto: Atilio Orellana Rojas, direktoro de IEL en Den Haag. ☎ Wedgwood Memorial College, Station Road Barlaston, Stoke on Trent, ST12 9DE, Britio. ☎/+44-(0)1782-372105, ☎/+44-(0)1782-372393. ☎/wedgwood.college@staffordshire.gov.uk.

13-16: Pedagogiaj Seminarioj en Herzberg/ Harz. Fakprelegoj, klerigado de estontaj E-instruistoj. Temo: *E-historio, interlingvistiko*. ☎ ICH (v. 05 mar).

14-18: Postkongreso de la 57-a IFEF-Kongreso en Braşov, Rumanio. ☎ 57-a IFEF-Kongreso (v. 07 maj).

18-25: Printempa Staĝo en Béziers/Vias, Francio. ☎ Christian Herbet, 22 La Le Bousquet, FR-34310 Montady, Francio. ☎/0467 218661, ☎/chrizo@worldonline.fr.

20 - 21: Intensa semajnfina Esperanto-kurso por progresintoj ĉe la VHS Düsseldorf, Germanio. ☎ Harald Schmitz (v. 29 apr).

21-22: Jarkongreso de Sveda Esperanto-

Federacio en Popoldomo de Haninge, sude de Stokholmo (samtempe jarkunsido de Eldona Societo Esperanto kaj la sveda sekcio de ILEI). ☎ Sveda Esperanto-Federacio, Vikingagatan 24, SE-11342 Stockholm, Svedio. ☎/(08) 340800, ☎/(08) 340810, ☎/sef@esperanto.se; www.esperanto.se.

21-25: Bibliaj Tagoj en Herzberg/ Harz. ☎ ICH (v. 05 mar).

22-24: Internacia Esperanto-Renkontiĝo en Forchheim, Germanio. ☎ Evelin Geist, Kasernstr. 19, DE-91301 Forchheim. ☎/+49(0)9191 15218, ☎/+49(0)9191 72 95 07. ☎/http://www.fen-net.de/~ea1448.

23 - 30: Festivalo de kulturoj en Ukrainio. Moto: *Ni montru unu al la aliaj erojn de niaj naciaj kulturoj: legendojn, kutimojn, morojn, manĝaĵojn, kantojn kaj dancojn*. ☎ Mikaelo Lineckij. ☎/+380-44-4320743, ☎/+380-39-2477483, ICQ 149228024 (matene 5:00-6:00 laŭ GMT). ☎/ml@espero.kiev.ua; http://www.espero.kiev.ua - "Aranĝoj".

28 - 29: Festo okaze de la 25 jaroj de LF-koop en La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☎ KCE (v. 23 apr).

29 maj-12 jun: Balkana Esperanto-Kongreso. Festivalo de Rozoj kaj Folkloro en Karlovo, Bulgario. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

junio

03-05: Internacia seminario pri naturkuracado en Herzberg/ Harz. Kunorganizanto: Internacia Naturkuraca Asocio. ☎ ICH (v. 05 mar).

04-05: 53-a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo en la urbo Kioto, Japanio. Temo: *Esperanto, ŝlosilo por Amikeco*. ☎ Micukaia Sumiko, Sitiku-kamihonmati 33, Kita-ku, Kioto, Japanio-603-8116, ☎/☎/+81-75-491-8568. ☎/setuko@ma3.seikyoku.ne.jp; http://www.esperanto.or.jp/kek53/.



10-12: Printempa Renkontiĝo 2005 en Middelburg, Nederlando. Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) festos la 40-jariĝon de sia agado. ☎ Nederlanda Esperanto-Junularo. ☎/info@esperanto-jongeren.nl; http://www.esperanto-jongeren.nl/pr2005.

10-12: Landa Kongreso de Norvega Esperantista Ligo en Morokulien (ĉe la norvega-sveda landlimo inter Kongsvinger kaj Arvika). Ekskursoj al lokaj historiaj vidindaĵoj. ☎ Per Johan Krogstie, ☎/+47-625-90695, ☎/pkrogst@online.no.

10-13: 53-a landa kongreso de ELNA en Austin, Teksaso, Usono. ☎ Philipp Dorcas, ☎/filipo@gruppo.org; http://russcom.org/esperanto/2005.html.

10-13: 100-a Skota Kongreso de Esperanto en Largs, Skotlando. ☎ Esperanto-Asocio de Skotlando, 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP, Skotlando. ☎/secretary@skotlando.org; www.skotlando.org.

12: 60-a Sudparaib-vala Esperanto-Renkontiĝo. ☎ Luiz Alberto de Oliveira Coelho, Rua Moreira César, 220: Paraiba do Sul-RJ, BR-25850-000, Brazilo. ☎/drakolui@yahoo.com.br.

15-23: 27-a Ĉebalta Esperantista Printempo en apudlaĝa ripozloko en Mielno, Pollando. ☎ PEA-Filio en Koszalin. ☎/+48-(0)94-3404563 aŭ+48-503-417-825, ☎/barslavo@wp.pl aŭ barslavo@poczta.onet.pl.

24 - 29: Esti virino kaj verkistino en la hodiaŭa mondo (feminismo kaj literatura konkurso sub la aŭspicio de PEN-Klubo) en La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☎ KCE (v. 23 apr).

24 jun - 01 jul: 15-a Eŭropa Esperanto-Forumo. Rondvojaĝo al Benelukso kaj Parizo tra DE-LU-BE-FR-NL. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

26: Esperanto-Meso en la katedralo de Speyer, Germanio, je la 15-a horo.



27 jun-02 jul: Internaciaj someraj kursoj de Esperanto en Lesjöfors, Svedio. ☎ Esperanto-domo, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. ☎/+46 (0)590-30909, ☎/+46 (0)590-30359, ☎/egarden@esperanto.se

julio



02-09: 78-a SAT-Kongreso en Zagreb, Kroatio. ☎ Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris, Francio. ☎/satesperanto1@free.fr; http://satesperanto.free.fr; http://www.geocities.com/sat_hr/kongres2005.html.

04-22: NASK – Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto 2005, ĉe la monde konata interkultura altleĝejo *The School for International Training* (Altlernejo por Internacia Trejnad) en nordorienta "nov-anglia" regiono de Usono. ☎ Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 Usono. ☎/360-754-4563, ☎/eddyellen@aol.com; http://esperanto.org/nask/progoveu.php.

09: Festivalo pri fiŝista supo en Baja, Hungario. ☎ bajai@posta.hu; http://www.berecki-baja.sulinet.hu/esperfishsup/.

09-15: Internacia Esperanto-Konferenco 2005 en marborda urbeto Rafina, Grekio. Ĉeftemo: *Bizanca kulturo*. ☎ Eric Laubacher, 1 rue Louis-Antoine de Bougainville, FR-78180 Montigny-Bx, Francio. ☎/+30 16712645, ☎/+30 13236746, ☎/manha@otenet.gr; http://osiek.org.

09-16: Postkongreso de la 78-a SAT-Kongreso ĉe Adriatiko kun ekskursoj al Birjuni, Pula, tra Istria duoninsulo. ☎ SAT (v. 02 jul).

09-16: Nonoso 2005 - Memzorga tendumado en norda Nederlando. ☎ informu@nonoso.tk; http://www.nonoso.tk/.

11-15: Naturamika Semajno en Grindelvaldo, Berna Kantono, Svislando. ☎ KCE (v. 23 apr).

11-16: 15-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK) en urbo Plovdiv, Bulgario. Temo: *"Aktivigo de la imuna sistemo laŭ diversaj metodoj"*. ☎ D-ro Imre Ferenczy, HU-9002 Győr, P.O.Box 143. Hungario. ☎/FerenczyMD@aol.com; www.esperanto.org/umea.

13-23: Renkontiĝo de Esperanto-Familioj. REF-2005 en la feriejo "Stanica Wodna" ĉe la lago "Mokre", Mazurio, norda Pollando. ☎ Bert Schumann, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sevigne, Francio. ☎/stanicaowodna@interia.pl; http://stanicaowodna.republika.pl/eindex.html.

14-22: 15-a Internacia Esperanto-Kongreso en Rigo, Latvio. Temo: *Folkloro kaj Turismo*. ☎ Māra Timermane. ☎/mtimermane@hotmail.com aŭ mtimermane@yahoo.com.

15-20: Internacia intensa lingvokurso en Herzberg/ Harz, Germanio. ☎ ICH (v. 05 mar).

15-23: 27-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, Pollando. ☎ PEA-Filio en Koszalin. ☎/+48-(0)94-3404563 aŭ +48-503-417-825. ☎/barslavo@wp.pl



16-23: Kultura Esperanto-Festivalo – KEF 2005 en Helsinko, Finnlando. Festivalo pri Esperanta kulturo: diversspeca muziko de roko al opero, danco, teatro, literaturo. ☎/hamalainen.riitta@kolumbus.fi.

16-23: 17-a Ekumena Kongreso 2005 en Pliscsaba, Hungario (58-a kongreso de IKUE, 55-a kongreso de KELI kaj 7-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro). ☎ Bagi Irén, HU-1201 Budapest, Baross u. 54/B, Hungario, aŭ Farkas-Tatár Éva, ☎/farkas-tatar_eva@externet.hu; http://www.ikue.org/kong2005/kong2005.html; www.chez.com/keli.

19-23: 40-a Brazila Kongreso de Esperanto en Porto Alegre, ĉefurbo de la ŝtato Suda Riogrando en la suda Brazilo. Temo: *Tutmondigo kaj frateco*. ☎ Lúcia Marder, ☎/aluli@terra.com.br.

20-23: Konferenco de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo en Vilno, hotelo Panorama. ☎ Aliĝiloj mendeblas ĉe Dieter Rooke, Aüssere Klus 14, CH-4702 Oensingen, Svislando. ☎/dieter.rooke@tiscali.ch.



23-30: 90-a Universala Kongreso de Esperanto, Vilno, Litovio. ☎ Litova Esperanto-Asocio,

Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio. ☎/+370-37-208503, -370-5-2391078, ☎/+370-37-228616. ☎/litova.ea@mail.lt; http://www.esperanto.lt/uk2005/index.html; (ĝeneralaj informoj ĉe UEA: http://uea.org/kongresoj/index.html).

23-30: Salto al Balto: 36-a Internacia Infana Kongreseto (IIK), apud Vilno. ☎ Komisiito: Stefan MacGill, Pannonia u. 30/1/6, HU-1136 Budapest, Hungario. ☎/+36-1-3495207, ☎/stefan.macgill@galamb.net aŭ surloke: S-ino Nijole Stakenienė.

26-31: Progresiga kaj perfektiga kursoj de Esperanto en La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☎ KCE (v. 23 apr).

30 jul-05 aŭg: 38-a ILEI-Konferenco en Kaunas. *Interkultura komunikado en edukado*. ☎ Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. ☎/ie001@tiscali.nl.

30 jul-06 aŭg: 71-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Vilno. ☎ Irma Sabonyte, p.k. 559, LT-01014 Vilnius, Litovio. ☎/+370-67437524, ☎/irma.sabonyte@kontrolte.lt. Brajlle: Alvydas Valenta, Naugarduko 91, LT-03203 Vilnius, Litovio. ☎/+370-65997690, ☎/alvydasvalenta@takas.lt.

30 jul-22 aŭg: Eŭropo-Afriko, rondvojaĝo tra LT-PL-DE-LU-FR-AD-ES-MA-ES-PT-ES-FR-MC-IT-AT-DE-PL. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

31 jul-07 aŭg: 61-a Internacia Junulara Kongreso en Zakopane, Pollando. ☎ 61-a IJK, Ireneusz Bobrzak, ul. Toruńska 82 m 133, PL-03-226 Warszawa, Pollando. ☎/ijk@tejo.org; http://uea.org/kongresoj/index.html; http://www.tejo.org/ijk.

aŭgusto

02-06: Esperantologia Fakultato (2-a sesio, unua semajno) en La Chaux-de-Fonds (Caïdefono). ☎ Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. ☎/☎/+41-32-9267407, ☎/kce.esperanto@bluewin.ch.



03-07: Esperantologia Fakultato, kun profesoroj Duncan Charters (didaktiko), Giorgio Silfer (literaturo/historio), Usui Hiroyuki (interkulturaj demandoj) en La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☎ KCE (v. 23 apr).

06-12: Somera Festivalo, kumlede kaj kunstudado en Barlaston, Britio. 3-nivela staĝo, eblecoj turism. ☎ EAB, Esperanto Office, Station Road, Barlaston, Staffordshire. ST12 9DE, Britio. ☎/+44-(0)1782-372141, ☎/eab@esperanto-gb.org.

06-15: Esperanto-ferioj ĉe Mediteranea Maro, Valencio, Hispanio. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).



08-14: Internacia Junulara Semajno en Vác, Hungario. ☎ Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87,

HU-1675 Budapest, Hungario. ☎/ijs@ijs.hu.

09-13: Esperantologia Fakultato, kun profesoroj Duncan Charters (didaktiko), Giorgio Silfer (literaturo/historio), Usui Hiroyuki (interkulturaj demandoj) en La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☎ KCE (v. 23 apr).

14-22: 14-a MELA (Memzorga Lagumado) en Deleĝhaza, Hungario. Sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbani. ☎/+36-30-2097864, ☎/DLSoap@gmx.net.

16-27: 39-a Internacia Esperanto-Feriado kun lingvaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj, en Kudowa Zdroj, Pollando. ☎ Silezia Esperanto-Asocio, str. Dubois 3/1, PL-50-208 Wrocław, Pollando. ☎/vrocslavo@poczta.onet.pl; http://vrocslavo.republika.pl/.



20-27: FESTO 2005 apud la lago de Saint-Peyres, en sudo de Francio. Ĝia temo: *Amo ĉiam...*. ☎/+33-2 40 69 48 95, ☎/ber@esperanto-jeunes.org.

23 aŭg.-01 sep: Vizito en Mongolio laŭ spuroj de Ĝingis-Hano. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

septembro

01-03: 1-a Landa Kongreso de Ganaa Esperanto-Movado. ☎ P.O.Box TS 404, Teshie Accra, Ghana WA. ☎/abaako43@yahoo.com.

02-07: 73-a Itala Kongreso de Esperanto 2005 en Rimini, Italio. ☎ Comitato Organizzatore del Congresso Italiano di Esperanto, Viale Zavagli 73, IT-47900 Rimini, Italio. ☎ Mario Amadei +39-051-6446675, ☎/diulionamagni@iol.it.

05-24: Sesio de Pola Societo de AIS kun instruado de Esperanto, pola lingvo kaj kultur-turisma programo en Lublin. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

10-11: 4-aj Someraj Dialogoj en Esperanto-Restadejo. Debatu, turismo kaj E-kurso. ☎ Salvador Aragay, Cami del Pou n-ro 9, ES-08691 Monistrol de Montserrat, Hispanio. ☎/34645 404754.

24-25: Jarkunsido de E-Ligo en Malsupra Saksio, Germanio. ☎ ICH (v. 05 mar).

24-30: 30-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo en Bydgoszcz, kun la 28-a AKB Studadesio de AIS, okaze de la Monda Tago de Turismo. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

25: Esperanto-Meso en la katedralo de Speyer (Germanio), je la 15-a horo.

30 sep-02 okt: Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES en Poznań, Pollando. ☎ Paweł Janowczyk, ul. Zawady 2/7, PL 61-002 Poznań, Pollando, tel.: +48-(0)602-283242, +48-61-8755879, ☎/janowczyk.pawel@poczta.onet.pl.

30 sep - 02 okt: 5-a KoKoLoRES (kafoklaĉa kaj luda semajnfino) en Herne, Germanio, kun Esperanto-kurso por komencantoj. ☎/petra.dueckershoff@web.de; http://www.esperanto.de/kokolores

oktobro

01-03: Internaciaj Pedagogiaj Tagoj en ICH (spertinterŝanĝo, konsultigo). Kunorganizanto: ILEI. ICH (v. 05 mar).



01-08: 13-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Calella, 80 km norde de Barcelono. Prelegoj, Premio Ada Sikorska, muziko, ekskursoj. Luis Serrano Pérez, Apartad 423, ES-08200 Sabadell, Hispanio. ☎ +34 93727 5021, luis_serrano@mixemail.com; www.terra.es/persona5/l/serrano2003/.

05-06: Staĝo pri Esperanto apud Nantes, Francio. ☎ Esperanto 44, Ferdi Vince, 13 rue du Docteur Schweitzer, FR-44600 St Nazare, Francio. ☎ 0240704674.

06-30: Vojaĝoj al Usono por viziti Kalifornion, Alaskon kaj Havajon. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

06 okt - 25 nov: Kvar vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo kun vizito de San Francisco, Alasko, Havajo, Guamo, Tokio, Seulo, Bangkoko kaj ev. Laoso kaj Kamboĝo. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

07-09: Pedagogiaj Seminarioj en ICH (temo: E-fondaĵoj, historio, metodologio). ☎ ICH (v. 05 mar).

08-09: 11-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Malago, unu el la 8 provincoj de Andaluzio, Hispanio. ☎ +34-95-2228960, j.herrero@trancemasa.es.

08-10: 12-a Aŭtuna renkontiĝo en Sylver Bay, Lake George, Novjorkio. Amikeca semajnfino (antaŭe konata kiel Okemo-Internacia Semajnfino Esperantista). ☎ Esperanto-Societo Kebekia, 6358-A, rue de Bordeaux, Montréal (Québec) H2G 2R8, Kanado. ☎ esperanto@sympatico.ca; http://esperanto.cam.org.

09-14: Memortagoj pri la IFEF-prezidinto Achim Giesner. ☎ ICH (v. 05 mar).

21-23: La 92-a Japana Esperanto-Kongreso en Jokohamo. La temo: *Rekonu Esperanton nun!* ☎ Japana Esperanto-Instituto, 162-0042 Tôkyô-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3. ☎ 03-3203-4581, ☎ 03-3203-4582, ☎ esperanto@jei.or.jp.

novembro

03-06: Unua kongreso de Esperanto-Federacio en Niĝerio. ☎ efen_2002@yahoo.co.uk aŭ afrikuoficejo@hotmail.com

05 nov - 11 dec: Kvin vojaĝoj kun mondvojaĝanto Remigiusz Mielcarek tra Tajlando, Laoso, Kamboĝo kaj Vjetnamio, por viziti kaj partopreni Zamenhofajn Tagojn. ☎ Esperantotur (v. 22 mar).

20: Esperanto-Meso en la katedralo de Speyer (Germanio), je la 15-a horo.

decembro

05-09: 2-a Internacia Konferenco de la Naturkuraca Asocio en Sanhajo, Ĉinio. Temo:

Maljuniĝo kaj naturkuracado. ☎ Internacia Naturkuraca Asocio, s-ro Wang Xigeng, Chizhou China Travel Service No.11 Changjiang Road (S), Chizhou, Anhui, CN-247000, Ĉina P. R. ☎ +86-13905669864 (24-hore), +86-566-2037171 (oficejo). ☎ +86-566-2031155. ☎ wxgespero@hotmail.com aŭ s-ro Harald Schicke, Schoolbrink 12, DE-27383 Hetzwege, Germanio. ☎ +49-(0)4263-94087, ☎ +49-(0)4263-94088, ☎ MZVerlag@web.de.

09-11: Pedagogiaj Seminarioj en ICH (temo: Gramatikaj aferoj, didaktiko, interlingvistiko). ☎ ICH (v. 05 mar).

09-11: VI-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj. ☎ Bjalistoka E-Societo kaj Fondaĵo Zamenhof, PL-15-269 Bjalistoko, str. Piękna 3, pk. 67, Pollando. ☎ elakarczeuska@interia.pl; esperanto.bialystok@interia.pl.

24-25: 28-a Jara Kongreso de Pakistana Esperanto-Asocio en Lahore. ☎ Pakistana Esperanto-Asocio, Esperanto Markaz, Chowk Shahidan, Multan, Pakistano. ☎ saluton123@esperanto-lan.org.



27 dec-03 jan: 22-a Internacia Festivalo (la tradicia novjara aranĝo por familioj kaj plenkreskuloj) en Trier, Germanio. Kadra temo: *Eŭropa pilgrandiginta*. Ekskurso al najbara Luksemburgio. ☎ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. ☎/☎ +49-5624-8007, ☎ +49-171-4964558. ☎ HDP@internacia-festivalo.de; http://www.internacia-festivalo.de.

2006

julio

08: Festivalo pri fiŝista supo en Baja, Hungario. ☎ bajai@eposta.hu; http://fishsup.ini.hu/.

23-28: Scienca Konferenco okaze de Centjariĝo de ISAE en Tavoletto, Italio. ☎ D-ro R. Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269 Eschwege, Germanio.



29 jul-05 aŭg: 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Firenzo, Italio. ☎ Itala Esperanto-Federacio, ☎ fei@esperanto.it; http://www.ukfirenco2006.it.

Daŭre aktualigata Kalendaro de Esperanto-aranĝoj troviĝas ĉe:
<http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

21-a de februaro 2005

La Esperanto-movado parto-prenas ankaŭ ĉi-jare la festadon de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, gvidatan de Unesko, kiu ĉi-jare aparte altiras la atenton de ĉiuj je la brajla skribo kaj je la signolingvoj.

Tiuj formoj de komunikado ankaŭ estas esprimoj de apartaj grupoj, kiuj ĝis nun estis multe ignorataj. Same ignorataj estas multaj lingvoj, ne apartenantaj al ekonomie aŭ politike fortaj grupoj.

Ni reasertas per la tuta forto, pri kiu ni disponas, ke politiko de komunikado kaj evoluigo, kiu estas indifera kaj ofte rekte malamika al la lokaj lingvoj, kondamnas al perforta kaj antaŭtempa formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo kaj la kulturojn kunligitajn al ili.

Ni alvokas al ĉiuj registaroj de ĉiuj landoj kaj al ĉiuj homoj seki la rekomendojn de Unuiĝintaj Nacioj, de Unesko kaj de la plej elstaraj pensuloj, kiuj agnoskis, ke *neniu reala edukado eblas per fremda lingvo*, kiel laŭvorte diris Gandhi. La internacia lingvo Esperanto estas lingvo por uzado nur en internaciaj rilatoj kiel neŭtrala maniero komuniki sen altdro de la propra mond-rigardo al la aliaj homoj. Tial ĝi protektas la pluekziston de la gepatraj lingvoj, kies funkcion ĝi ne celas transpreni, kiel daŭre faris tra la tuta historio kaj ankoraŭ nun faras naciaj lingvoj, kiam ili estas uzataj por internaciaj rilatoj.

Pro tio la Esperanto-movado festas kune kun Unesko la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo, kiu estu ankaŭ okazo por festi la samvalorecon de ĉiuj lingvoj kaj de ĉiuj kulturoj kaj la internacian komunikadon surbaze de egaleco kaj reciproka respekto. *

Komisionano Figel por multlingvismo

Ni prilaboris prilivingvan agadplanon surbaze de multlingveco, kiu inkluzivas tiujn niajn lingvojn kiuj ne estas oficialaj, sed certe ne Esperanton. Ni havas sufiĉe da vivantaj lingvoj en malfacilaĵoj, por krei, krome, lingvojn artefaritajn, diris pasintjare Viviane Reding, tiam la membro de la Eŭropa Komisiono respondeca pri multlingvismo.

Estis Reding, luksemburgianino, kiu evoluigis la *Eŭropan jaron de lingvoj*: ... de ĉiuj lingvoj, senescepte: de agnoskitaj lingvoj, de neagnoskitaj lingvoj, de majoritataj lingvoj, de minoritataj lingvoj, ĉar mi ĉiam diris, ke ne ekzistas lingvoj grandaj, ne ekzistas lingvoj malgrandaj, ekzistas nenio krom patrin-lingvoj, kaj ili ĉiuj grandas, eldifine.

Ĉiam freŝaj politikistoj alportas novajn esperojn diversflanke. Ankaŭ esperantistoj esperas ke la nova Eŭropa Komisiono estos pli favora aŭ almenaŭ ne tiom misinformita pri la internacia lingvo. Dum longa intervjuo kun la nova membro de la Eŭropa Komisiono respondeca pri edukado, kulturo kaj multlingvismo Jan Figel, estis ŝanco starigi tiurilatajn demandojn. – Ĉu neŭtrala lingvo kiel Esperanto povas esti vojo por pluteni la lingvan diversecon en Eŭropa Unio? Mia kredo estas ke spite al ĉiuj komplikaĵoj, multlingvismo estas grava eco de la Unio, diris Figel. Mia respondo estas *multe da lingvoj* eĉ se tio signifas kostojn. Ĉi tio estas pli bona ol elekti iun artefaritan aŭ unuforman solvon, daŭrigis Figel. El la demando, la nova komisionano miskomprenis ke la celo de Esperanto estas anstataŭi naciajn lingvojn. Kiel venki tiujn gravajn miskomprenojn ĉe Figel kaj aliaj potenculoj?

Martin Säckl, direktoro de la publikrilat-firmao *Eacon Consulting*, havas multjaran sperton en Bruselo. Ĉu profesiaj Esperanto-lobiistoj aŭ grupo de favoraj parlamentanoj helpus? *Kompreneble. Kaj des pli se estus agnoskita interparlamenta grupo en la Eŭropa Parlamento*, diras Säckl. Li substrekas la gravecon de pozitivaj personaj kontaktoj



Konsilianto Martin Säckl: Ne estas Esperanto, kiu bezonas lobistojn. Estas Eŭropo kiu bezonas Esperanton!



Komisionano Jan Figel: Mia respondo estas multe da lingvoj eĉ se tio signifas kostojn. Ĉi tio estas pli bona ol elekti iun artefaritan aŭ unuforman solvon.

kun Esperanto-parolantoj. Säckl unue konatiĝis kun Esperanto en 1987 ĉe seminario de Junaj Eŭropaj Federalistoj. *Iu membro de la aŭstria Esperanto-movado entuziasmigi min pri Esperanto. La homo donis vizitkarton kun la kompleta gramatiko de Esperanto dorsoflanke!* Säckl bedaŭras ke la angla fariĝas pli kaj pli iuspeca Esperanto por la eŭropa elito: La filozofo Immanuel Kant parolas pri la normiga potenco de faktoj. Ni adaptas ĉion al situacio, ĉu ĝuste aŭ ne ĝuste.

Ĉu ankaŭ Figel al kutimiĝas al la tielnomata normiga potenco de faktoj kiam temas pri Esperanto kaj lingva samvaloreco? Dum la intervjuo de 50 minutoj, estis okazo ree pridemandi lin el alia angulo. Ĉu vi havas personajn spertojn pri Esperanto? Figel denove evitis rektan respondon: *Mi ne povas imagi ke membro-ŝtato fordonas sian propran oficialan lingvon al la familio de novaj lingvoj. Ĉiu solvo, teorie, devas esti vivanta solvo, ne artefarita. La historio de Eŭropo instruas ke eĉ la latina ne estas uzata en konferencoj por kuracistaj spertuloj. Ĝi ne estas vivanta lingvo, diris la eŭropa komisionano Figel.*

Se li ne – aŭ ankoraŭ ne – apogas Esperanton, kiujn celojn alstrebas Figel rilate al lingvoj? *Mi estas la unua komisionano speciale respondeca pri multlingvismo. Daŭris pli ol 40 jarojn por meti multlingvismon ne nur sur la administracian, sed ankaŭ politikan tagordon. Eŭropa Unio estas por multlingvismo, kaj mia rolo estas promocii ĝin.*

Sed en Bruselo ĉiuj parolas pri multlingvismo. Ĉiuj scias ke ĉiuj lingvoj estas samvaloraj kaj nur kelkaj – kiel la angla, franca kaj germana – estas multe pli samvaloraj ol lia slovakaj. Ni ne povas kaj ne devas subvalorigi malpli uzatajn lingvojn. Eŭropa Unio devas fari ĉion por gardi kaj promocii la principojn de multlingvismo, diras Figel. La baza vero estas ke bonas lemi fremdajn lingvojn, inkluzive la anglan, kiu estas komuna lingvo por multe da homoj. Sed ni ne devas anstataŭigi multlingvismon per unulingvismo.

Figel ankaŭ volonte parolis pri la ĉiam pli grava potenco de la angla en Eŭropa Unio, kaj agnoskas ke anglalingvaj landoj gajnas ĉiam pli por instrui la anglan aŭ vendi siajn lingvajn produktojn. Figel sajnas esti homo kiu batalas por multlingvismo kaj kredas je la valoro de diverseco en Eŭropo. Sed kiel plej bone informi lin pri la valoro de Esperanto?

David Ferguson

Kiu kapablas interpreti?

Fojfoje eĉ la esperantistoj bezonas interpretistojn, kapablajn labori profesinivele en budoj. Tio estas malfacila laboro: samtempe interpreti el Esperanto en la anglan kaj inverse, aŭ por aliaj lingvoj. Pro la nervostreĉa laboro profesiuloj alternas ĉiujn 20-33 minutojn...



Detlev Blanke

La Nitobe-kolokvoj en Prago 1996, Berlino 1999 kaj pasintjare en Pekino bezonis tiajn spertulojn. Por tiaj kaj similaj aranĝoj kun kelkaj laborlingvoj, direktitaj al la neesperantista publiko, nur ege malfacile estis troveblaj laborpretaj homoj.

Nur esceptokaze je nia dispono estis profesiaj interpretistoj, ne por Esperanto, ili ne ekzistas. Ili tamen profesie interpretis por aliaj lingvoj kaj samtempe bone regas Esperanton. Ili konas la metion de interpretado kaj kapablas plenumi la atendojn. Bedaŭrinde ekzistas grandaj miskomprenoj pri la temo, interalie laŭ jena skemo: *Mi bone konas Esperanton, sekve mi kapablas traduki; mi kapablas traduki, sekve mi kapablas interpreti* ktp. Tio nur malofte funkcias.

Kiel konate ankaŭ bonaj konantoj de la lingvoj ne nepre kapablas bone traduki en sian gepatran lingvon aŭ el ĝi Esperanten. Oni ja devas konscii pri diversaj problemoj por tion bone fari. Kaj nur malmultaj bonaj tradukistoj aŭ regantoj de la lingvoj samtempe havas la lerton (kaj la nervojn) interpreti. Ekzistas kelkaj tiaj homoj, kiuj ja interpretis ekz. dum la Nitobe-simpozioj. Sed ankaŭ estas fakto, ke ne ĉiu el la volontuloj liveris akcepteblan rezulton.

Diversaj spertoj montris, ke estas urĝe necese sisteme serĉi talentulojn.

Tio signifas, ke UEA (la Centra Oficejo) devus scii:

a) Kiu esperantisto estas profesia interpretisto, samtempe bona lingvospertulo kaj pretus se necese interpreti 'siajn' lingvojn en Esperanton, respektive el ili en 'siajn' lingvojn?

b) Kiu esperantisto, eĉ ne estante profesiulo, tamen disponas pri la necesaj kuraĝo, lerto kaj sperto?

Estus tre dezirinde, se tiuj malmultaj profesiaj interpretistoj en niaj vicoj ne nur disponigus siajn spertojn kaj kapablojn por konkretaj aranĝoj, sed – eble en la kadro de trejnseminarioj – helpus trovi kaj kvalifiki taŭgajn personojn, kiuj fariĝus nia interpretista rezervito. Interesatoj pri la temoj plej bone sin direktu al la Centra Oficejo. **Detlev Blanke**

Tutnova, nemalhavebla por kongresantoj!

Litova lingvo per Esperanto-okuloj

Gramatiko, komparo kun Esperanto, multaj ekzemploj, vortaro, tekstoj, slango, proverboj, blasfemoj,...

Marc Vanden Bempt; 2005, FEL - Esperanto 3000. €16,50 + sendokostoj, 185 p., grandformata A4.

Mendoj: esperanto3000@esperanto.be
Esperanto3000, Rulenslaan 10, BE 3020 Winksele

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 23-an de aprilo 2005 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Specialaj ofertoj

Speciala gasto:
BALDUR RAGNARSSON



- ★ Bazaro de e-aĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpaga servataj

Korespondanta Servo Mondskala en 2004

210 esperantistoj petis korespondantojn ĉe Korespondanta Servo Mondskala en la jaro 2004. Jam tri jarojn la nombro de petantoj restas sur sama nivelo (220 en 2002, 230 en 2003), dum en 2001 ĝi estis 385.

Kreskanta uzo de retumado jam de pluraj jaroj reduktis la nombron de petantoj. Pli grava kialo de la subita falo post 2001 verŝajne tamen estas nesufiĉa diskonigo de la servoj de KSM fare de Esperanto-gazetoj kaj kursgvidantoj, pro kio UEA instigas ilin al pli da aktiveco ĉirilate.

Inter la pasintjaraj petantoj estis 32 retuzantoj. Tri petantoj volis korespondi nur rete. Same kiel en antaŭaj jaroj, plej multe da petantoj estis el Francio (59) kaj la duan lokon okupis Brazilo (42). El Kubo kaj Pollando al KSM sin turnis po 12 petantoj. La plej rimarkindaj faloj kompare kun 2003 estis en Rusio (el 35 al 6) kaj la afrikaj landoj (el 53 al 30). Entute KSM ricevis petojn el 37 landoj.

Jam de 1990 la korespondan servon de UEA prizorgas S-ro François Xavier Gilbert. La adreso de KSM estas: B.P. 6, FR-55000 Longeville en Barrois, Francio. Informilon kaj alĝilon oni povas peti kontraŭ unu respondkupono. Por rekte ricevi adresojn de korespondemuloj, oni sendu du respondkuponojn kun detalaj indikoj pri si mem kaj pri la dezirataj korespondantoj.

La retadreso de KSM estas: ksmesperanto@aol.com kaj de ĝia TTT-ejo: <http://www.multimania.com/kosomo>. En la TTT-ejo troviĝas ankaŭ alĝilo, kiun oni povas surpaperigi kaj sendi al KSM. ☐

Recenzoj



Ĉu baldaŭ forgesita libro?

Fajrejo. Skizoj kaj noveloj. Johan Hammond Rosbach. Prozo originala, rakontoj. Ascoli Piceno / Venafro: Gabrielli / Eva, 2002. 147 p. 20cm. Prezo: € 10,50



Vica novelkolekto de Johan Hammond Rosbach *Fajrejo* konsistas el 25 mallongaj eroj.

Ne eblas kompreni: kial la aŭtoro verkis ĉion ĉi, kion li volis diri per tiu aŭ alia novelo. La priskribitaj personoj estas tro bonaj (aŭ mal-, ĉiakaze unu-forestas.

flankaj) kaj ĝuste tial aspektas nereaj. Eĉ kiam temas pri dummilitaj travivaĵoj, la rakonto ofte koncentriĝas ĉe iu bagatela detalo, atentokaptaj eventoj kaj agoj (preskaŭ) tute forstas.

Plejparto de la noveloj similas unu la alian: rememoroj pri fora pasejo, kampara vivo, vojaĝoj tra la mondo, duonfabelaj edifaĵoj. Nur kelkaj elstaras: *JOH 14.6* komenciĝas simile al ceteraj, sed poste prezentas surprizon. Ankaŭ en *La cervo*

neatendita lasta frazo ŝanĝas la tutan impreson. Aliflanke, *La pordo, Ruĝaj krucoj* kaj *Plurala ikso* estas fuŝaj eĉ kompare kun la nealta ĝenerala nivelo de la kolekto.

Nature, maljunuloj ŝatas rakonti siajn rememorojn – sed ja oni konscii, ke plejparte io kara por la rakontanto restas neinteresa kaj nekomprenebla por aŭskultantoj.

Eble samaĝuloj de la aŭtoro pli ŝatos ĉi libron (tamen, eble ili preferus rakonti proprajn rememorojn, sed ne legi la fremdajn?), sed ĝeĵunulojn ĝi agacos eĉ pli ol min. Se vi havas elekton – prefere legu ion alian ol *Fajrejo*. Tamen por stopi tempon la libro taŭgas, precipe por etaj paŭzoj, ja la noveloj mallongas, do eblas legi pecojn sen diŝiro.

Sufiĉe multas (almenaŭ okulfrapas) preseraroj: *trembilis* (eĉ plurfoje), *firnamento*; anglismoj aŭ germanismoj: *ekzamo* (ekzameno), *problemoj* en senco de lerneja taskoj k.a.

Do unu plia libro el multaj, kiu restos nerimarkita kaj baldaŭ forgesita... **Valentin Melnikov**

Du verkoj pri budhismo

Enkonduko en budhismon. Yamaguti Sin'iti. JBLE. Nagoya. 2002. 112 p. 21cm. ISBN 4 901651 00 5. Prezo: € 12,00. **Kelkaj faktoj pri la budhismo.** Gunnar Gällmo. Religio. ESE. Stockholm: ESE. 2002. 77 p. 21cm. ISBN 9185288276. Prezo: € 10,50

Aperis du libroj pri budhismo. Ambaŭ estas verkitaj de budhanoj, kiuj en siaj libroj priskribas sian religion nek ĉefe propagandecle, nek teorie kaj science, sed de interne kaj kun engaĝiĝo. Ambaŭ libroj estas legindaj kaj por studentoj pri religio, kaj por personoj, kiuj havas ĝeneralan intereson pri religioj, dezirantaj lerni pli pri budhismo, kaj – kiel kristano mi povas nur supozi – por kredantaj budhanoj kiuj volas pliprofundiĝi en sia religio. Ambaŭ libroj dividiĝas en tri ĉapitroj, el kiuj la unua pritraktas Budhon (Ŝakja-munion) kaj lian vivon. Ambaŭ libroj finiĝas per glosaro. Neniu el la libro temas pri diversaj skoloj budhismaj, pri ĝenerale popola budhismo aŭ pri budhismaj temploj kaj bildoj. Cetere la libroj estas tre malsamaj.

En *Enkonduko en Budhismon*, Yamaguti Sin'iti, mem ŝin-budhano, en sia dua ĉapitro en la bele presita libro traktas la fundamentajn ideojn de budhismo: laŭkondiĉa estiĝo, ateismo, malkonstanteco de fenomenoj, ĉio estas suferiga, malaprobado de atmano kaj metempsikozo, kontraŭ metafiziko, nirvano, ŝunĵato, meza vojo kaj amo. Sub la rubriko heterodokso en budhismo, la verkinto traktas skolojn, kiujn li kontraŭas, ekz.:

esoterismo kaj sinkretismo. En la lasta ĉapitro pri praktikoj por budhistoj, aparte interesa estas la parto pri "budhismo kaj socio", kie la verkinto komparas la liberigan teologion kristanisman de la 1970-aj jaroj kun kelkaj tendencoj en moderna budhismo. En apendico legeblas multaj sanktaj frazoj.

Gunnar Gällmo, mem teravadano – theravadano laŭ la ortografio de Gällmo – en sia *Kelkaj faktoj pri la budhismo* en la dua ĉapitro en la iom simple vinkita libro pritraktas la instruon budhismen (Dharmen). En sia tria ĉapitro li priskribas la instruatan (Sanghon), traktante la historion de budhanoj ekde la komenco ĝis nun. Asoko kaj Olcott estis gravaj por disvastigi budhismon en Azio kaj en Eŭropo. Apartan atenton ricevas la budhismo dum la lastaj cent kelk jaroj. Gällmo multe interesiĝas pri terminoj budhanaj, kaj ne malofte diskutas ilin kaj proponas ne-PIV-ajn formojn.

Aparte interesa estas la sinteno al kristanismo de la verkintoj. Yamaguti inklinas atenti la similecojn inter budhismo kaj kristanismo; Gällmo inklinas atenti la malsimilecojn.

Esperantio riĉiĝis per du novaj legindaj libroj.

Leif Nordenstorm



Kohera verko pri korea medicino

Kompleksia medicino kaj saama akupunkturo. Puramo Chong. Dobřichovice: Kava-Pech, 2003. 267p. 28cm. ISBN 8085853558. Prezo: € 31,50

Pro la teknologia eksplodo kaj sekva modernigo de la vivo, oni mise antaŭvidis ke la orientaj medicinaj iom post iom perdis grundon al la okcidenta medicino. Sed la plurismo en kuraculturo verŝajne gajnas grundon. La sano ne estas rimedo liverbla de kuracisto al malsanulo. Ĝi estas ekvilibra stato en la fizika, psika kaj socia vivo. La filozofoj kaj kuracistoj el la tradiciaj medicinaj tra la mondo komencis diri ke la kompleksia medicino estas taŭga, malkara, amika vojo al la sano. Ili asertas ke la kompleksia medicino emas brakumi ĉiun aspekton de la homa vivo mensa kaj korpa, kaj strebas renversi la patalogian staton en la fiziologian.

Gravas la fakto ke alternativoj en la sansistemo varias laŭlande. Ekzemple, ajurvedo, la barata medicino, rekonas 7 temperamentojn de la homoj kaj laŭe priskribas la dieton kaj medicinon. La denaska *natur*o de la korpo estas heredita kaj tio ne ŝanĝiĝas. Oni povas nur nutri ĝin bone aŭ malbone. Viaj provizoraj fizikaj kaj mensaj statoj influas vin nur portempe, sed via ena naturo neniam ŝanĝiĝas. Se vi manĝus aŭ kondutis kontraŭ ĝi, vi malsaniĝus. En diversaj kulturoj tia estas la alirmaniero kompreni la sanon kaj malsanon. Sed kia estas tiu ena *natur*o de la korpo? La korea tradicia medicino kaj aliaj tradiciaj medicinaj provis klare vidi tiun kaj fondi la bazajn, kredable eternajn principojn. La moderna evoluo en tiu kampo estas strebi objektiviĝi la eltrovitajn principojn por universala aplikebleco. Momente la moderna medicino havas tian universalecon, aplikeblan ĉie kaj tuje. La nuna libro volas proponi tiujn sanprincipojn al la tuta mondo.


La korea tradicia medicino, kiu kreskis sur la fundamento de la ĉina medicino, dividas la homojn en 4 kaj poste 8 grupojn. La teorio de kvar korp-karakteroj, proponita de la filozofo Lee Jema (1837-1900), evoluis al la teorio de ok korp-karakteroj dank' al Kwon Down kaj Lee Myngbok. El ili Lee Myngbok estis la moderna anatomiisto. La kvar temperamentoj gvidas la sanstaton. Ekzemple en tejangino-kompleksio la pulmo estas forta kaj la hepato estas malforta. En teumino la hepato estas forta kaj la pulmo malforta. En sojangino la pankreato estas forta kaj la reno malforta. En soumino la reno estas forta kaj la pankreato estas malforta. Plie, depende de la interrilato inter tiuj ĉi kvar kompleksioj ok kompleksioj estas elpenseblaj. Kvankam tiuj ok situacioj ne estis rekte nomitaj de Lee, ili estas facile diveneblaj. En tejangino povas esti ke aŭ la reno aŭ la pankreato estas forta aŭ malforta kune kun fortaj pulmoj kaj malforta hepato. La organoj reno, pankreato, hepato kaj pulmo ne indikas sin mem sed grupojn de organoj. Do, diversaj organoj de la korpo estas dividitaj en kvar grupojn kaj ili estas reprezentataj de pulmoj, hepato, pankreato kaj reno. La organ-teorio ankaŭ ligas kvin elementojn al la organoj, ekz. fajro al la koro, metalo al la pulmoj, tero al la pankreato, akvo al la reno kaj ligno al la hepato.

La korea medicino komprenis ke la korpa karaktero dependas ankaŭ de la geografiaj cirkonstancoj. Per bildoj kaj tabuloj kun sufiĉe da informo, la leganto povas analizi la korp-naturon kaj scii al kiu grupo oni aliĝas. Estas utilaj informoj pri manĝeblaĵoj kaj evitendaĵoj al ĉiu grupo. La O-ringa testo, eksplikita tekste kaj bilde, provas objektivigi la korp-naturon. Kvankam la aŭtoro rekomendas la O-ringan teston, li samtempe dubas pri la dependebleco de la O-ringa, ĉar tia testo ne povas ĉiam doni al ni konfirmon pri nia vera 'naturo' aŭ konstitucio. La testo ne bezonas maŝinojn sed nur la ekzamenanton kaj ekzamenaton. Puramo Chong tre lerte priskribas la teston en unu detala ĉapitro.

La libro enhavas du partojn. La unua parto traktas la kompleksian medicinon de Koreio kaj la dua parto la 'saaman akupunktur'ojn. La ĉapitro pri la pulspalpo estas meze de tiuj du partoj de la libro. La pulspalpo estas tre grava diagnozilo en orientaj medicinaj kaj ankaŭ en la korea. La karakteroj de la pulso, ekzemple flosanta, profunda, malrapida kaj rapida, signas ke la homo havas unu el la karakteroj de la kvar korpaj statoj. La saama akupunkturo estas simpligita sed tre efika versio de la ĉina akupunkturo. Saam vivis antaŭ 400 jaroj en la Chosun-dinastio. Li estis bonzo kiu simpligis la teorion de la ĉina akupunkturo kaj lokis novajn meridianojn post severa meditacio kaj enrigardo. Saam aludas al nur 60 punktoj kontraŭ la miloj en la ĉina sistemo. Tiuj akupunkturaj punktoj situas sur la brakoj kaj gamboj, do estas tre konvenaj por kaj kuracisto kaj malsanulo. Tiel, Saam kreis solidan teorion el la roka groto, kie li loĝis.

Konsiderante la lokajn kondiĉojn, la ĉina medicino estis bone adaptita al koreaj kondiĉoj. De la 5-elementa teorio kun la jin-jang-koncepto de la Han-dinastio, tra la periodo de 3 statoj (4-a /10-a jc) kaj ĝis la Chosun-dinastio (15-a – 19-a jc) la ideoj maturiĝis. Poste venis fazo de japana okupacio. En Koreion la okcidenta medicino estis enkondukita. Unuflanke Ĉinio kaj aliflanke Japanio. Tamen la Korea medicino travivis la japanan premon. Plie, la 6-elementa korestila akupunkturo eniris Japanion. Nun Koreio fieras pri sia tradicio de proprastila medicino. Situante inter gigantoj, la korea medicino agnoskas ambaŭ influojn. Meze de tia situacio, la koreaj enlumuloj serĉis la veron en la homa korpo kaj eltrovis ion gravan. La akupunkturo, valora donaco de Ĉinio, evoluis sub diversaj formoj en diversaj landoj. La aŭtoro memfide diras ke Koreio plejsimpligis ĝin kun sama efikeco. Nun, ĉiujare pli ol 700 kuracistoj pri korea medicino elvenas el la kolegioj. Ili ne ŝatas nomi sin orientaj medicinistoj sed kore-medicinistoj.

Ĉu la libro estas por profesiulo? Entuziasmo? Lernanto? Laiko? La aŭtoro respondas ke ĝi estas enkonduka libro por akupunkturistoj kaj kuracistoj. La kvalito de la libro taŭgas por la profesia studento de korea medicino. La esperantistaro bonvenigas verkojn pri raraj temoj. Ĉiu tradicia sistemo de medicino havas siajn proprajn loĝlokon kaj rolon. La medicinaj antropologoj kaj konscias pri la vera rolo de tiel nomataj KAM-sistemoj (komplementaj kaj alternativaj medicinaj). La moderna medicino estas kosmopolita kaj monelspeziga. La kosto por la diagnozo jam superas la kurackostojn. Do la KAM-sistemoj povas savi monon kaj eĉ doni pacon al pacientoj. Oni komprenu ke ne estas konkuro inter la KAM-sistemoj kaj moderna medicino. Plie, la parametroj uzataj en la moderna medicino juĝas la veron de la KAM-teorioj. Ja popoloj trans la limoj respektas kaj apogas la KAM-sistemojn. Sed, la medicinaj antropologoj opinias ke KAM ne povas profunde ŝanĝi la evoludirekton de la moderna medicino. Kompreneble, kompleksiaj medicinaj ne povas estiĝi 'revolucion en la kampo de medicino' aŭ 'novan paradigmon' en medicino. KAMoj kaj montras interesan vojon al malsanuloj regajni ekvilibron en la korpo per nedangeraj metodoj kaj al sanuloj protekti sian sanon per simplaj ŝanĝoj en la ĉiutaga vivo. D-ro P.V. Ranganayakulu



Laste aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.


100 jarojn Esperanto-societo "Verda Stelo" – Stara Zagora. 1903-2003. Nejko Atanasov. Stara Zagora: La aŭtoro, 2003. 80p. ISBN 9543140014. 20cm. Bulgaringva. Abunde ilustrita retro-rigardo en la historion de aktiva E-grupo. € 5,70

Esperanto in Chemnitz und im Bezirk Erzgebirge/Vogtland. Rudolf Burmeister. Red. Detlev Blanke. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des E-Verbandes im Kulturbund der DDR, 2004. 197p. 30cm. Germanlingva. Paĝoj el la historio de la E-movado en Chemnitz (eksa Karl-Marx-Stadt) kaj la regiono ĉirkaŭ ĝi. € 12,00

Loĝata insulo, La. A. kaj B. Strugackij. El la rusa trad. M. Bronštejn. Moskvo: Impeto, 2005. 304p. ISBN 5716101224. 20cm. Unu el la plej ŝatataj scienc-fikciaj romanoj de la fratoj Strugackij, plena je aventuro kaj filozofio. € 19,80

Look at Esperanto. EAB. Hatton Park Warwick: Bessacarr Publications, 2004. 8p. ISBN 1904953018. 30cm. Ilustrita informilo anglalingva celanta

Jarkolekto Esperanto 2004. Rotterdam: UEA, 2004. 264p. ISSN 00140635. 27cm. 11 numeroj. Bind. € 30,00.




Triona rabato ekde tri ekz.

Jŭraté kaj Kastytis. Maironis. Ilustris Vladimiras Bernsiovas. El la litova trad. P. Čeliauskas. Kaunas: Ryto varpas, 2004. 15p. ISBN 9955646004. 30cm. Poemo-fabelo de klasikulo de la litova literaturo pri serena kaj tragika amo. € 4,50

Legendo pri vilna kastelo. Vladas Mozūriūnas. Ilustris Algė Varnaitė. El la litova trad. P. Čeliauskas. Kaunas: Ryto varpas, 2005. 14p. ISBN 995564604 7. 30cm. Ilus. Versa legendo pri kastelo en la litova ĉefurbo. € 4,50

Loĝata insulo, La. A. kaj B. Strugackij. El la rusa trad. M. Bronštejn. Moskvo: Impeto, 2005. 304p. ISBN 5716101224. 20cm. Unu el la plej ŝatataj scienc-fikciaj romanoj de la fratoj Strugackij, plena je aventuro kaj filozofio. € 19,80

Look at Esperanto. EAB. Hatton Park Warwick: Bessacarr Publications, 2004. 8p. ISBN 1904953018. 30cm. Ilustrita informilo anglalingva celanta



precipe infanojn kaj junulojn. € 0,90

Plena ilustrita vola pŭg'! Diversaj. 2004. 38p. 30cm. Mikspoto de bildstrioj, karikaturoj kaj tekstoj, nek aparte decaj, nek speciale flataj al Esperanto kaj ĝiaj parolantoj. € 2,10

Se mi ne estus. Jeronimas Laucius. Ilustris Rima Stasiūnaitė. El la litova trad. L. Stražnickas. Vilnius: Trys žvaigždutės, 2005. 16p. ISBN 9955641088. 29cm. Eksciu kiel timo, doloro, tristo kaj laco estas utilaj kaj, sekve, nedetruendaj. € 4,50

Sentinelle, La 1937 1-5. Verkaro de E. Privat. Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidnik: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 270+10+65p. 28cm. En la franca. 117 artikoloj pri diversaj temoj en diversaj mondopartoj. € 39,00

Sentinelle, La 1938 1-5. Verkaro de E. Privat. Kolekto Artikoloj. E. Privat.



La nova jaro venis ne nur kun novaj eldonaĵoj, sed ankaŭ kun prezmalaltiĝoj! Komence de la nuna jaro la prezo de dekoj kaj dekoj da varoj malkreskis, en kelkaj kazoj draste. Vizitu nian retan katalogon kaj mem konvinkigu: <http://www.ue.org/katalogo/>

Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidnik: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 290+10+63p. 28cm. En la franca. 118 artikoloj pri politiko, historio, ekonomio. € 45,00

Sentinelle, La 1941 1-5. Verkaro de E. Privat. Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidnik: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 264+10+66p. 28cm. En la franca. 117 diversspecaj artikoloj. € 39,00

DISKOJ

Rebela sono. Dolchamar. Donnevill: Vilnikosmo, 2005. 51 min. Kun tekstobroŝuro. Metamorfoza Dolchamar prezentas 12 muzikaĵojn dolchamarajn. KD. € 16,50

Ŝafejo de la naŭa profeto / Granda origino. Roman Dobrzyński. Varsovio: La aŭtoro, 2005. 27 + 30 min. Filmo pri la Bahaa Kredo + Filmo pri Oomoto. DVD. € 18,00



UEA tiras atenton de UN-Komisiono al lingvaj homaj rajtoj

Pro siaj konsultaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, UEA havas la rajton liveri al UN-organoj skribajn dokumentojn, kiuj rilatas al tagordaj punktoj de iliaj kunvenoj. Uzante tiun eblecon la prezidanto Renato Corsetti sendis dokumenton al la Komisiono de UN pri Homaj Rajtoj por distribuo inter la membroj de ĝia 61-a sesio, kiu kunvenos en Ĝenevo de la 14-a de marto ĝis la 22-a de aprilo. La dokumento rilatas al la tagorda punkto, kiu pritraktos la ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn.

UEA atentigas la Komisionon, ke laŭ la dua artikolo de la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en la Deklaracio apartenas al ĉiuj homoj sen diferencigo i.a. laŭ lingvo, sed malgraŭ tio UN kaj ĝiaj membroŝtatoj donis al la lingva aspekto de la homaj rajtoj malmulte da atento ĝis nun.

La dokumento de UEA elstarigas la negativajn sekvojn de la edukado de infanoj en alia lingvo ol la gepatra. Laŭ multaj esploroj uzo de netaŭga lingvo en lernejo estas unu el la plej gravaj kaŭzoj, aŭ eĉ la plej grava kaŭzo, de antaŭtempa forlaso de lernejo, kiu siavice kondukas al seriozaj sociaj problemoj, ĉar ĝi pligrandigas la riskon je senlaboreco, krimado, alkoholismo kaj drog-uzado. Laŭ studo de UN mem, la plej malriĉaj landoj povus ŝpari grandegajn sumojn, se la lingvaj homaj rajtoj de iliaj loĝantoj estus respektataj per la uzado de lokaj lingvoj en instruado. Pli ĝenerale UEA komentas ankaŭ la uzon de nur kelkaj difinitaj lingvoj por

kontaktoj inter homoj de malsamaj popoloj kiel malkontentigan kaj diskriminacian praktikon kaj kiel kontraŭdiran al la dua artikolo de la Universala Deklaracio.

UEA proponas, ke la Komisiono starigu laborgrupon por pristudi la problemojn de lingvaj homaj rajtoj kaj la malobservon de homaj rajtoj pro lingvaj malegaleco kaj maljusteco. En sia raporto la laborgrupo devus proponi mez- kaj longperspektivajn agojn por certigi lingvajn homajn rajtojn en diversaj lingvaj kaj kulturaj situacioj. La Komisiono devus ankaŭ apogi la klopodojn de fakuloj, interalie de UEA, esplori kaj eksperimenti la plej efikajn manierojn elekti la lingvojn uzotajn en lerneja instruado, kun la celo respekti lingvajn homajn rajtojn kaj kuraĝigi la evoluon en la koncernaj landoj. UEA ankaŭ renovigas sian malnovan proponon, ke la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN metu la temon *Lingvaj kaj Homaj Rajtoj* en la tagordon de unu el siaj estontaj kunvenoj.

Simmonds, kiu rikoltis plurminutan aplaŭdodon de la publiko. (P. Gubbins)

● **ĈINIO:** La 30-an de januaro Pekina Esperanto-Asocio okazigis en la Pekina Tibet-mezelempo amuzan kunvenon por festi la Printempan Feston. La kunvenon ĉeestis pli ol 50 pekinaj esperantistoj, inkluzive de laborantoj el la redakcio de *El Popola Ĉinio*, Ĉina Esperanto-Ligo kaj Ĉina Radio Internacia. Pei Zhi ludis per memfarita muzikil-segilo klasikajn ĉinajn muzikaĵojn. Lernantoj de la Pekina Tibet-mezelempo prezentis tibetnacajn kantojn kaj dancojn. Ĉiuj kun granda intereso kaj plezuro faris divenludon en Esperanto. (Jiang Limin)

● **ISRAELO:** La 17-an de januaro Mor Dii, 17-jara lernanto de Esperanto, iniciatis kaj mem efektivigis 50-minutan programon pri Esperanto, kadre de la programo por la junularo, dissendata en la ŝtata radio-stacio *Kol-Israel*. Li lerte prezentis bone planitan kaj seriozan programon, intervjunte la junulinon Tali Wandel, kiu sidis kun li en la studio, la junulon Sergej Tirin kaj la instruiston kaj aktivulon Gian Piero Savio (ambaŭ pertelefono). La programo prezentis multajn faktojn, personajn impresojn, opiniojn kaj kantojn en Esperanto. (J. Šemer kaj A. Wandel)

ĉe <http://ru.wikipedia.org/>. La ruslingva Vikipedio lastatempe furoras en la rusa interreto, ĝia amplekso forte kreskis kaj atingis 11 500 mil artikolojn. Detala rakonto pri Esperanto en la unua paĝo de la projekto estas grava atingo. (Slavik)



● **BRITIO:** Cent jarojn da originalaj Esperanto-dramoj festis britaj teatro-amantoj en januaro ĉe Wedgwood Memorial College, Barlaston. La semajnfino estis dediĉita ĉefe al studado kaj provprezentado de originalaj monologoj, precipe el la pionira periodo de la Esperanta dramarto; sed la ĉefa ero estis prezentado de kredebla la unua publikigita kaj libere havebla Esperanto-dramo – la monologo *La duonokulvitro* de Augusto Baissac, aperinta en 1905. Brile prezentis ĝin la brita aktoro Colin



● **HISPANIO:** La 11-an de februaro, en la Fakultato pri Tradukado de Soria, prelegis kadre de la doktora kurso pri Esperanto kaj tradukado, kiun gvidas D-ro Juan Zarandona, pri la temo *La rolo de Esperanto en la defendo de la lingva diverseco* D-rino M. R. Urueña, profesoro pri Internacia Juro en la Universitato de Valladolid. La prelego en la hispana estis atente aŭskultata de la lernantoj, kiuj fine faris demandojn (L. Hernandez)

● **BRAZILIO:** La 15-an de decembro (Z-tagaj) okazis en unu el la ĉefaj edukaj kanaloj de Brazilo (TVE/Rio de Janeiro) 15-minuta intervjuo pri Esperanto, elsendita al la tuta Brazilo. Estis la eduka kanalo mem, kiu proponis la intervjuon, kaj partoprenis ĝin Aloisio Sartorato kaj la junaj esperantistoj Paulo Fabiano, Renata Ventura kaj Rosinha Matos. (A. Sartorato)

● **RUSIO:** Ĉiusemajne la ruslingva Vikipedio elektas elstaran artikolon por meti ĝin en la ĉefpaĝon kaj en specialan kategorion *Elektitaj artikoloj*. Lastatempe la plej enciklopedieca evidentiĝis artikolo pri Esperanto, kies komencon eblas vidi

Fake

● **FILMO:** La 26-an de januaro en Tokio la korea bildstria filmo *Esperanto* gajnis premion de la Korea Instituto por Kultura Promocio, ĉe la 19-a Japana Ciferecfilma Grandpremiado. *Esperanto*, kiu gajnis la plej altan premion inter bildstrioj, estas verkita de OH Jha-Gyun, filmarta studento de Hansu-Universitato en Koreio.

● **DISERTACIO:** La 1-an de februaro magistrigis ĉe la universitato de Utrecht, Nederlando, studentino pri la angla lingvo Emily van Someren, per disertacio pri lingvaj kaj tradukaj problemoj en Eŭropa Unio. En sia verko Emily alvokas Eŭropan Union serioze konsideri Esperanton kiel laborlingvon kaj investi monon por ĝia evoluigo kaj pretigo por tiu rolo. Wim Jansen, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la universitato de Amsterdamo, mentoris la magistrigon.

● **DIPLOMVERKO:** La 27-an de januaro la sekretariino de Litova Esperanto-Asocio Aida Cizikaitė defendis en la Vilna jura fakultato de distanca eduka instituto de Moskva Ŝtata Industria Universitato diplomverkon *Lingvaj rajtoj: Stato "de jure" kaj "de facto"*. La verko temas pri lingva politiko, juraj statusoj kaj reguligado de lingvoj, lingvaj problemoj, jura aspekto de lingva nacismo, justeco de ideologioj de superado de lingvoj, lingvaj homaj rajtoj aŭ lingvaj rajtoj, lingvoj kaj juro de Eŭropa Unio, kun resumoj en pluraj lingvoj, inkluzive Esperanton. (P. Jegorovas)

Terminologia Forumo en Vilno

Kiel kutime dum la kongresoj okazas arango dediĉita al la spertinterŝanĝo inter homoj, kiuj verkis/verkas fakvortarojn aŭ alimaniere okupiĝas pri problemoj de la evoluigo de la faka lingvo en Esperanto, aparte pri problemoj de kreado de bonkvalitaj terminologioj.

Ankaŭ dum la ĉi-jara UK en Vilno okazos simila aranĝo: la Terminologia Forumo. Ĝi i.a. ebligu al kolegoj: ● Informi pri verkitaĵoj fakvortaroj kaj pri la problemoj spertitaj dum la verkado; ● Informi pri planataj aŭ prilaborataj projektoj kaj eventuale varbi kunlaborantojn; ● Diskuti la lastajn klopodojn refunkciigi la Terminologian Centron de UEA (TEC). Kontribuontoj bv. sin direkti al la organizanto de la aranĝo Detlev Blanke (dblanke.gil@snafu.de)

Persone

● **AUGUSTO CASQUERO:** En Salou (Katalunio, Hispanio) la 4-an de oktobro 2004 estis unuafoje asignita la internacia Premio "Ada Sikorska Fighiera". Ricevis ĝin Augusto Casquero el Valencio pro sia plurjardeka sindediĉa agado por Esperanto en diversaj landoj kiel kurs-gvidanto, preleganto kaj organizanto de multaj naciaj kaj internaciaj kongresoj. La transdono okazis kadre de la 12-a Internacia E-Semajno de Kulturo kaj

Turismo, malfermita de la loka urbestro: cento da esperantistoj el sep landoj partoprenis en la semajnaj programoj (prelegoj, debatoj kaj ekskursoj).

La venonta ĉiujara premio, dediĉita al la memoro de Ada, kiu dum 35 jaroj redaktis kaj eldonis la tiaman sendependan *Heroldo de Esperanto*, estos asignita dum la 13-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Calella (01-08 okt 2005).



Oficiala informilo



NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Aŭstrio: A. Heiligenbrunner. Irlando: D. OhEalaith.

PATRONOJ DE TEJO

Argentino: R.G. Calógero. Belgio: G. Maertens. Britio: M.H. McClelland. Finnlando: R. Pyhälä, T. Oittinen, K. Hautamäki, M. Laamanen, A. Ritamäki. Germanio: N. Caragea, G. Macioszek, R. Makabe, F. Reisel. Hispanio: J.J. Vera Martin. Luksemburgio: B. Moon, J.S. Meyer. Nederlando: S. Idzerda, F.J. Pieterse-Kruger, D. ten Haaf. Svedio: W. Posthuma.

SOCIETO ZAMENHOF

Argentino: R.G. Calógero. Aŭstralio: J.R. Bishop. Aŭstrio: S. Stamm. Belgio: G. Maertens, E. Ernst. Britio: J.C. Wells. Danio: E. Hjorth. Finnlando: I. Heikkilä, K. Hautamäki, I. Tanskanen, H. Tuomola. Francio: A. Albault, R. Boré, L. Marin. Germanio: H. Bily, G. Macioszek, R. Makabe. Hispanio: R. Urueña de Hernández, L.E. Hernández. Hungario: P.P. Denke. Japanio: K. Deguti, K. Syōzi, K. Kikusima, N. Syōzi, G.G. Pompilio. Kanado: B.D. Kaneen. Koreio: M. Young Kim. Kroatio: B. Ćović. Luksemburgio: B. Moon, C. Nourmont. Nederlando: G.A.M. van Bergeijk, N. Overwater, J.W. Moonen, E.C. Klaver, H. Oortwijn, S.P. Smits, S. van Westrhenen, J. Calado, D. ten Haaf, G.F. Makkink. Norvegio: T. Katikami-Nielsen, T. Jansson. Svedio: L. Holmlund, M. Häggström, T. Johansson, S. Fritz. Usono: H. Tonkin, J. Edwards, A. Seabold Casey, L.C. Harmon, W.R. Harmon.

DNACOKJ

Ĝis la 1-a de februaro 2005

Ĝenerala kapitalo: Nederlando: Legaco W.C. Keizer 40940,00. *Sumo ĉi-jara:* 40 940,00.

Afriko: Brazilo: M. Eustáqui da Silva 640,75. *Sumo ĉi-jara:* 640,75.

Fondaĵo Azio: Japanio: M. Hirotaka, T. Ono, H. Yamaguti, S. Yamato – po 14,47; Y. Takeuti 28,92; Y. Yazaki 14,86. *Sumo ĉi-jara:* 101,66.

Konto Arabio: Egiptio: R. Lecat 100,00. Usono: M. Kennedy 7,00. *Sumo ĉi-jara:* 107,00.

Konto Eŭropo: Francio: Y. Vierende 30,00. *Sumo ĉi-jara:* 30,00.

Konto Novjorka Oficejo: Hispanio: R. Urueña 100,00; L.E. Hernández 50,00. *Sumo ĉi-jara:* 150,00.

Fondaĵo Canuto: Francio: Y. Vierende 27,00. Germanio: G. Macioszek 110,00. *Sumo ĉi-jara:* 137,00.

Konto Edukado / Wüster: Francio: Esperanto France-Est 500,00. *Sumo ĉi-jara:* 500,00.

Fondaĵo Espero: Francio: Y. Vierende 30,00. Germanio: K.H. Schaeffer 25,00. Hispanio: R. Urueña, L.E. Hernández (por viktimoj de la martremoj en Azio) – po 500,00. Kroatio: D. Drakula (por fam. Zvirac) 100,00. *Sumo ĉi-jara:* 1155,00.

Fondaĵo Junularo: Argentino: R. Sanchez 2,00. Aŭstralio: T. Manley 17,31. Belgio: L. Buyst 5,00. Germanio: M. Muller, S.&H. Fisahn – po 5,00; R. Pflueger 10,00; K. Weirich 50,00. Rusio: M. Mamkin 5,00. *Sumo ĉi-jara:* 99,31.

Ĝenerala kaso: Germanio: H. Bily 20,00; M. Odenwald 15,00; F. Rössler 6,00; J. Radam 5,00. Nederlando: J. Niemans 25,00; G.F. Makkink 390,00; J. Pranger 10,00. *Sumo ĉi-jara:* 471,00.

Al ĉiuj tre korean dankon! UEA



5-a Monda Socia Forumo: Speciale por la junularo

● *Esperanto?! Mi jam aŭdis pri ĝi!* ● *Vidu, Esperanto!* ● *Ĝi estas simila al la latina.* ● *Ĝi estas simila al la itala!*

Jen estas esprimoj, kiujn oni multfoje aŭdis kaj de preterpasantaj homoj, kaj de multdekoj da viroj kaj virinoj, kiuj venis peti pliajn informojn pri Esperanto. La Monda Socia Forumo estas senkompara mondskala evento, kiu sendube reprezentas la veran demokratian ideologion de popolaj plurfakaj grupoj, kies espero estas edifi al pli justa, solidara kaj interkompreniga mondon.

La 5-a MSF (26-31 jan 2005, Porto Alegre, Brazilo) kalkulis je la partopreno de ĉ. 155 mil homoj venintaj el 135 landoj el la kvin kontinentoj. Politikistoj, ekonomikistoj, ekologoj, verkistoj, muzikistoj, ĵurnalistoj, religiuloj, lingvistoj, prostituitinoj, gejoj, kontraŭrasistoj ktp, ktp. Fine, iu bunta gamo da interesoj diversaj.

Kaj Esperanto? Denove la regiona esperantistaro kaptis tiel unikan okazaĵon por disvastigi Esperanton. Ĉi-foje oni starigis budon, sub la aŭspicioj de Brazila Esperanto-Ligo kaj UEA, tre vizitatan de la homoj dum la kvar tagoj. Multis la nombro de tiuj, kiuj vizitis la budon kaj por aĉeti librojn, revuojn, KD-ojn, kaj por havi informojn pri la neŭtrala internacia lingvo Esperanto kaj ĝia kultur-movado.

Du prelegaroj estis realigitaj: *Esperanto: ebla solvo al la babelismo* kaj *La lingva riĉeco de Esperanto en la esprimo de la penso*. En ambaŭ prelegis César Dorneles Soares (Brazilo), Marcelo Stoduto (Brazilo), Paulo Izaías Ereno (Brazilo), José António Vergara (Ĉilio) kaj Nijl Blonstein (Usono). Ĉe la fino de tiuj aranĝoj oni okazigis unuhoran minikurson por la ĉeestantoj. En tiu lasta etapo, la publiko montriĝis tre entuziasma, kiam ili konstatis, ke post malpli ol unu horo ili jam kapablas legi teksteton Esperante, sen misprononcoj. Ili ankaŭ lernis kelkajn bazajn demandojn kaj respondojn ofte uzatajn en elementaj konversacioj.

En la prelegaro de la organizaĵo Libero por la Lingvoj, sub la respondeco de Prof. François Simonnet (Francio) kaj kun partopreno de Prof. Maria Luíza de Carvalho Armando (Brazilo) kaj D-ro José António Vergara (Ĉilio), oni atentigis la publikon pri la serioza problemoj rilata al la t.n. "lingva genocido". La



faldfolio pri tia ero de la programo estis 4-lingva, inkluzive Esperanton.

Aparte menciinda estis la fakto, ke oni prioritatis la diskonigadon de Esperanto inter la junularo, kiu amase gastis en la Internacia Kampejo de la Junularo (ĉ. 35 mil homoj). Tre impresis la granda intereso de la gejunuloj pri nia afero. Ŝajnas, ke la junulara fako komencas ampleksigi sian horizonton tiamaniere, ke Esperanto ne plu iĝas stranga vorto nekonata kaj preskaŭ sensignifa. Esperanto jam estas ĝenerale konata, sed ankoraŭ ne studata de la plejmulto. Jenas nia klopodo, por ke ni "venku la barojn", laŭ Zamenhof.

Denove la Monda Socia Forumo fariĝis unika kaj grava evento por diskonigi Esperanton. Oni esperas, ke okaze de la venontaj Forumoj, tiaj kiaj en Porto Alegre kaj Mumbajo, la "pacaj batalantoj" de nia Movado plukonsideros ĝin valora oportuno por atentigi pri Esperanto kaj ties celo.

César Dorneles Soares kaj Marcelo Stoduto

Sukceso en la skolta Ĵamboreo

Fondita en 1918, Skolta Esperanto-Ligo, la unua internacia skolta organizaĵo, jen progresas, jen malprogresas. Jen ĝi havas bonajn rilatojn kun Monda Organizaĵo de la Skolta Movado (kiu fondiĝis poste), jen ĝi ricevas malpermesojn.

Ĉi-jare, danke al la klopodoj de ArgentEJO, SEL sukcesis instalii senpagan budon en la 12-a Tutamerika Skolta Ĵamboreo – grandega tendumado kiu okazas ĉiun kvaran jaron kun 13 mil partoprenantoj.

Ankaŭ la UEA-prezidanto komprenis la gravecon de la okazaĵo kaj petis la samideanaron sendi salutkartojn al la evento. Antaŭ la inaŭguro la organizantoj volis scii, kio estas SEL, kaj kiu lingvo estas tiu de la kartoj.

TEJO subvenciis la aliĝon de la rovero (*skolto pli ol 17-jara, rim. de la red.*) Marcelo Daniel Lucero, kaj la redaktoro de *La Skolta Mondo* subvenciis la bud-materialon (10 mil modernaj vizitkartoj kun la nomoj de la deĵorantoj, T-ĉemizoj, koltukoj, KD-oj kun la verko *Pli Vastaj Horizontoj en Skoltado*). Hans Bakker sendis 100 ekzemplerojn de la lernolibro *Ĵamborea Lingvo*. Pro stulta dogana burokrateco la estraro de SEL ne sukcesis eniri Argentinon, tamen Marcelo kaj Fernando Inocenao laboregis – kaj ne povis persone profiti de la tre interesaj aktivadoj



La inaŭguro

La budo de SEL dum la Ĵamboreo

por rovero. Sed ili ĉiutage varbis, akceptis milojn da interesitoj, instruis fulm-kursojn kaj intervjuigis ĉe la Ĵamborea radio. En kontakto kun la Ĝenerala Sekretario de Monda Skolta Movado, ili sukcesis kapti lian simpatian al Esperanto. Nun ni esperu la samajn ŝancojn en Eŭrojam '05 kaj en la gravega Jubilea Tutmonda Ĵamboreo en Britio 2007. Ni laboru kaj esperu!

Roberto Resende

Aŭstralia Somerkursaro

La 20-a Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro okazis en Adelajdo inter la 9-a kaj la 21-a de januaro kun pli ol 80 partoprenantoj.

Venis gastoj el Francio kaj Japanio (Mazodze). Aparte bonvena estis la instruistoj el Germanio (Sabine Trenner) kaj Zimbabvo (Oliver Kiel ĉiujare, ankaŭ nun okazis ekza-

menoj, teatra kaj kant-konkursoj kaj multaj ekskursoj. Nova programero estis la "Forumo", kadre de kiu okazis dudeko da diversaj prelegoj. La lastvesperan bankedon originale buntigis la projekciado de pli ol 500 fotoj, faritaj de la kursanoj mem. La prezon de la venditaj diskoj kun la fotoj kaj la enspezon de la aŭkcio la kursanoj donacis al la Zimbabva Esperanto-Instituto kaj al la movado en sudbarata urbo Bangaloro. Organizate de Diane Lukes oni kolektis monon ankaŭ por la indonezia movado kaj viktimoj de la cunamo.

Trevor Steele



menoj, teatra kaj kant-konkursoj kaj multaj ekskursoj. Nova programero estis la "Forumo", kadre de kiu okazis dudeko da diversaj prelegoj. La lastvesperan bankedon originale buntigis la projekciado de pli ol 500 fotoj, faritaj de la kursanoj mem. La prezon de la venditaj diskoj kun la fotoj kaj la enspezon de la aŭkcio la kursanoj donacis al la Zimbabva Esperanto-Instituto kaj al la movado en sudbarata urbo Bangaloro. Organizate de Diane Lukes oni kolektis monon ankaŭ por la indonezia movado kaj viktimoj de la cunamo.

Trevor Steele



Anoncetoj

1 vorto = 1 internacia rpk (€ 0,81). Ni ne respondecas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondopetoj zorgas ankau Korespondanta Sero Mondskala, B.P.6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.



Ekde 1 mar 2005 Ionel Onet kaj Eldonejo Bero havas novan adreson: Pisuisssestr. 38, NL-3034 WK Rotterdam, Nederlando.

Transloĝiĝo de Berveling + abono je Fonto: Gerrit Berveling & Madzy van der Kooij transloĝiĝis: ekde januaro 2005 ilia nova adreso estas: Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Novaj abononj por la revuo *Fonto* ankoraŭ estas akceptataj interalie rete: gerrit.en.madzy@planet.nl. Nepre avertu min pri novaj abononj! Por la jubilea jarkolekto 2005 (12 numeroj – la 25-a jaro de la revuo!) vi pagas nur 30 eŭrojn je samtempa pago al UEA-konto bays-f.

500 div. Esperanto-stampoj, Esperanto-pm. Ofertolisto kontraŭ neuzitaj pm. je la valoro de 1 EUR. Neussner, D-37284 Waldkappel, Germanio.

Kion sendi kien?

– **Viajn kontribuojn**, artikolojn kaj fotojn por la revuo, rimarkojn k.s. bonvolu sendi al la redakcio en Slovakio (vidu la kolofonon).

– **Reklamaciojn** pri ne-ricevo de la revuo, adres-ŝanĝojn, informojn pri la abono aŭ pago de la membrotito k.s. bonvolu sendi al la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, Nederlando (vidu la kolofonon).

Nepala esperantisto deziras korespondi tutmonde (la aĝo ne gravas). Hobioj: bildkartoj, komputilo, legado, vojaĝoj: Navin Lal Shrestha, GPO Box 11753, Kathmandu, Nepalo, rete: skribu_navin@yahoo.com

La angulo de



Esperantlingva Verkista Asocio
<http://www.everk.org/>

Nikolai Hohlov: El «Eŭropo»

Aŭskultu kaj konfidu la jam proksiman horon, en kiu nova sango trafliĝos nian koron; ankoraŭ kelkaj limoj, hezitoj kaj decidoj – kaj kun la mirtaj branĉoj pilgrimoj blankaj idoj, kuraci viajn vundojn kaj super la cikatroj trasenti la hontigan brutecon de la patroj, starigi novan mondon de l' paco kaj libero, proklami la Laboron reĝino de la tero...

Tempestas la mistikaj abismoj de l' animo, sed jam vidiĝas lumo en nova malproksimo; obee donas vojon laciĝo kaj miopo al kredo de l' estonto de la patrino – Eŭropo.

Nikolai Hohlov (1891-1953), rusa, logis plejparte en Moskvo. Li aktivis en la vigla loka movado post la unua mondmilito. Lian ĉefan verkon, «La tajdo» (1928), karakterizas muzikplena liriko kaj larĝspira sento pri la fluo de la historio.



Forpasis

Floyd C. Anderson (1923-2004), dumviva membro en Riverton WY (Usono), mortis pasintjare.

Marc Delforge (1907-2005) forpasis la 13-an de februaro en Bruselo. Veterana esperantisto, kiu dum multaj jaroj aktivis pri informado kaj instruado kadre de la klubo Esperantujo.

Georg Eisenhardt (1925-2004), delegito kaj fakdelegito pri filozofio, historio kaj literaturo en Detmold (Germanio) forpasis la 29-an de novembro.

Ervin Fenyvesi (1917-2005) forpasis la 12-an de januaro en Budapeŝto. Longtempa laborinto en la Hungara E-Asocio, fakdelegito pri geografio, historio kaj naturismo, kaj redaktoro de la bulteno *Naturista Vivo*. Aktive esperantigis beletrajn kaj fakajn tekstojn, precipe por *Hungara Vivo*.

Walter L. Gnagy (1924-2004), dumviva membro, iama delegito kaj fakdelegito pri geologio en Colville WA (Usono), forpasis lastatempe.

Frato Bertino Goerner (1910-2004), fakdelegito pri katolikismo, forpasis la 18-an de aŭgusto en Pindamonhangaba SP (Brazilo).



Jaroslav Mráz (1933-2005), mezlerneja profesoro, forpasis la 12-an de januaro 2005. Erudicia preleganto pri lingvaj kaj historiaj temoj, gvidanto de

skribaj kursoj. Abunde tradukis el la ĉeĥa poezio, i.a. *Vortoj de la nokto* (2002) de Z. Bergrová kaj, kun M. Malovec, *Ekaiĉdi la animon* (1998) de V. Ludíková. Kunlaboris kun K. Kraft por lia *Vortaro ĉeĥa-Esperanta* (1998).

Nguyen Quang (1926-2004), fakdelegito pri lingvistiko kaj instruado en Hanojo, forpasis pasintjare.

Elfriede Sudec (1925 - 2005) mortis la 19-an de januaro en Zagrebo. Ŝi esperantistiĝis en 1948, aktivis en Hamburga E-Societo kaj estis kasisto de LKK de la Hamburga UK en 1974. En 1985 ŝi migris kun sia e-ista edzo al Hispanio, kie ili iniciatis Internacian E-Semajnon, kiu okazis dum 13 jaroj. Ekde 1997 ŝi vivis en Kroatio, la patrolando de sia edzo.

Elsa (Eija) Salovaara (1920-2004) forpasis la 28-an de decembro en Helsinko. Ŝiaj

rakontoj aperis en ŝia propra libro *Kie boacoj vagadas* (1967; 2-a eld. 1994) kaj en la kolekto *Sub la signo de la Verda Stelo* (1964).

Imre Szenes, konata ĵurnalistino, forpasis la 29-an de januaro en Budapeŝto. Longtempa laborinto en Hungara E-Asocio, iniciatinto kaj ĉefredaktoro de la iamaj *Eszperantó Magazin* kaj *Világ és Nyelv*.



Solomon Vysokovskij (1933-2005), poeto, tradukisto, kunaŭtoro de la poemlibro *Moskvaro* (1998) forpasis la 19-an de januaro en Moskvo. *

SPECIALA OFERTO POR SONBENDOJ

Kun la alveno de kompaktaĵoj, la iam popularaj sonbendoj iom post iom eksmodiĝas. Tamen ili havas sian valoron, eĉ se nur nostalgian. La Libroservo de UEA decidis proponi plejparton de sia sonbenda stokoj en tiu ĉi speciala oferto: por samtempa mendo de tri ĝis naŭ sonbendoj (identaj aŭ ne), sendotaj al la sama adreso, oni ricevas sesonan rabaton; por samtempa mendo de minimume dek sonbendoj (identaj aŭ ne), sendotaj al la sama adreso, oni ricevas sesonan rabaton kaj oni ne pagas sendokostojn. La mendoj por tiu ĉi speciala oferto devas atingi la Libroservon de UEA antaŭ la 1-a de junio 2005. Al ĉiuj netaj prezoj de sonbendoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝos 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj por malpli ol 10 sonbendoj, aldoniĝos 10% por sendokostoj (min. 2,25 eŭroj). Tiu ĉi oferto ne kombineblas kun aliaj ofertoj aŭ rabatoj.

Afrika nokto, Dennis Rocktamba. Germanio, 2001. €7,50.
Al venko!, József Dinnyés. Hungario, 1986. €12,00.

Amitaj, amataj, amotaj, Mikaelo Bronŝtejn. Rusio, 1997. €7,20.

Antaŭ du jaroj, Tanaka Akiko, Kawamoto Hiromi. Japanio, 1989. €9,30.

Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj, Sylla Chaves. Brazilo, €6,00.
Dangera ul', Jak Le Puil'. Italio, 1978. €9,00.

De Pont-Aven al Varsovi', Jak Le Puil'. Italio, 1985. €9,00.
De tempo al tempo, Mikaelo Bronŝtejn. Svedio, 1993. €4,80.

Dimanĉa koncerto, Anjo Amika. Svislando, 1994. €14,40.
Edgar + Asorti. Litovio, 1995. €4,50.

Elektitaj kantoj, Sylla Chaves. Brazilo, 2001. €4,50.

EO LA kompilaĵo, M. Bronŝtejn, S. Bozin, J. Amzejev, V. Ŝiškin k.a. Rusio, 1998. €12,90.

Esperanto: Tutmonda muziko, Rainer Conrad. Germanio, 1991. €7,80.

Famaj kantoj por belaj horoj, K. Kudlíková, M. Smyčka. Ĉeĥio, 1995. €5,10.

Fantoma fenomeno, Rolf Fantom. Britio, 1996. €9,90.

Finnaj ĉhoj, Kaje-ensmablo, A. kaj R. Tanskanen. Finnlando, 1995. €7,80.

Folioj de mia memoro, Ĵomart Amzejev, Nataša Gerlah. Svedio, 1990. €9,90.

Frandu piron, Johán Valano. Svislando, 1982. €13,80.

Harmoni', Klára Mikola, László Garamvölgyi. Hungario, 1992. €10,50.

Imagu, John Douglas. Britio, 1987. €7,50.

Invito al ĝojo, Nikolin'. Svislando, 1987. €12,90.

Israelo ne ĉesas kanti, Tova Ben-Cvi. Israelo, 1993. €9,00.

Jadwiga kantas, Jadwiga Dzięgielewska. Pollando, 1995. €10,20.

Jen vivo mia, Gafur Mirzabajev. Uzbekio, 1996. €6,60.

Jula lando, Nikolin'. Svislando, 1988. €13,50.

Juliano kantas, Julián Angulo Hernández. Kubo, 1997. €8,40.
Kantoj de l' popolo, Ĥoro Cantica, Muzikensmablo Keĉka. Ĉeĥio, 1993. €4,80.

Kantoj el himnaro Esperanta, Bil Munsil. Usono, 1992. €10,50.

Kantu Esperante kun Janico kaj Johano. Usono, 1988. €6,00.

Kantu kaj lernu, Sylla Chaves. Brazilo, €12,00.
Korvo kaj aliaj poemoj, La. Deklamas L.H. kaj I. Knoedt. Brazilo, 1981. €12,60.

Kuna diso, La, Sylla Chaves. Brazilo, €5,70.
Latinamerika mozaiko, Héctor Jiménez. Kubo, 1997. €8,40.

Laŭ lula ondo, Nikolin'. Svislando, 1990. €12,00.
Londono kantas, Londona Esperanto-Ĥoro. Britio, 1983. €5,10.

Mesio, Kamerorkestro de Hungara Ŝtata Koncertensmablo. Hungario, 1989. €9,00.

Mi rompas mian rutinon, Georgina Almanza. Kubo, 1996. €8,10.

Muzika Literatura Mondo, K. Kalocsay / J. Baghy. Svislando, 1991. €11,40.

Najado, Atonín Dvořák. Du sonbendoj. Ĉeĥio, 1996. €15,00.
Ne donu tro, Jak Le Puil'. Francio, 1994. €12,60.

Neniu povas ŝangi la hieraŭon, Era Kankkunen. Svedio, 1996. €9,00.

Nur per amo, Nikolin'. Svislando, 1989. €12,90.

Omaĝe al L.L. Zamenhof, Aldo Fiorentin. Italio, 1999. €7,80.

Originalaj Esperanto-kantoj, Gennadij Timofeev. Rusio, 2001. €7,50.

Per nia nura vol', Suzana. Italio, 1980. €9,00.

Poemoj, kanzonoj, monologoj, Georgina Almanza. Kubo, 1996. €7,80.

Polaj kolendoj, Koruso Muzilo. Pollando, 1987. €7,80.

Por marto, Akiko Tanaka k.a. Japanio, 1987. €9,00.

Por vidi la mondon, Anjo Amika. Hungario, 1987. €8,70.
Rememoru kun bruna ŝtono. Svedio, 1992. €7,80.

Requiem, Solo. Hispanio, €12,00.

Revenas mi, Jak Le Puil'. Italio / Francio, 1984. €5,40.

San Diego vokas, Alberta Casey. Usono, 1981. €8,10.

Sankta fajreto, La, Valentinas Ĉepkus. Litovio, 1997. €8,10.
Saskia Veen kaj Edward Hoepelman. Nederlando, 1990. €11,70.

Sub la Napola suno, Valerio Mottola. Italio, 1998. €11,70.

Sub la stel' de l' espero, Koruso Muzilo. Pollando, 1994. €8,10.

Team' en Esperanto. Slovakio, 1989. €8,70.

Teatra vespero de Vida Jerman. Kroatio, 1996. €10,20.

Trifolio kantas en Esperanto. Svedio, 1994. €7,80.

Unuaj paŝoj, Valentina (Maria Nan). Rumanio, 1998. €9,30.

Veselin Damjanov koncertas en Kanado. Kanado, 1985. €6,90.

Vi alta libera, Kiruna Motet-Ĥoro. Svedio, 1982. €13,20.

Vi memoru pri ĝardenoj, Jadwiga Dzięgielewska. Pollando, 1997. €9,60.

Vinilkosmo-kompil' 1. Francio, 1995. €10,50.

Vinilkosmo-kompil' 2. Francio, 1996. €8,70.

Vivu Esperantujo, Georgo Handzlik. Italio, 1989. €9,00.

Vizaĝoj, La Mevo. Japanio, 1993. €9,30.

Voĉoj el Kubo, M. Ramos, B. Márquez, V. Feliú. Kubo, 1999. €8,40.

Vojo, vivo, vero, Ensmablo Muzilo. Pollando, 2000. €9,00.

Vulkano, Solo. Hispanio, 1994. €12,30.



Oriento kaj okcidento – al reciproka kompreno? Georges Fradier. Trad. C.D.A. Capp. Longa, ilustrita eseo provanta komprenigi la diferencojn inter la du mondpartoj. Rotterdam: UEA, 1962. 50p. 21cm. € 1,50. Triona rabato ekde tri ekz.



Diskriminacio. Div. Aŭtoroj. Red. Renato Corsetti. Prelegaro el la 65-a Universala Kongreso de Esperanto. Rotterdam: UEA, 1984. 175p. 21cm. € 7,50. Triona rabato ekde tri ekz.




Ekologio kaj ekonomio. Red. I. Gether kaj A. Lukács. Prelegoj de la Internacia Ekonomikista Simpozio, Budapeŝto, decembro 1981. Budapeŝto: Scienca Eldoncentro de UEA, 1982. 94p. 20cm. € 7,50. Triona rabato ekde tri ekz.



Enprizonigo – krespusko de erao. César Barros Leal. Trad. James Resende Piton. Pri enprizonigo kaj alternativaj punoj kiel solvo de kontraŭleĝaj agoj. Fortaleza: Edições Demócrito Rocha, 2002. 151p. 20cm. € 6,90. Triona rabato ekde tri ekz.




Kio estas demokratio? 80 demandoj kaj respondoj. David Beetham kaj Kevin Boyle. Ilus. Plantu. Trad. Geoffrey Sutton. Facile komprenebla manlibro pri la esenco, celoj kaj praktika funkciado de demokratio. Rotterdam: UEA, 2000. 143p. 21cm. € 9,90. Triona rabato ekde tri ekz.



Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj. Leah Levin. Ilus. Plantu. Trad. Edmund Grimley Evans. Gvidlibro de Unesko por antaŭenigi kaj protekti homajn rajtojn. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. 21cm. € 9,90. Triona rabato ekde tri ekz.



Paĉjo, kio estas rasismo? Tahar Ben Jelloun. Trad. Armela Le Quint kaj Ĵak Le Puil. Dialogo inter patro kaj filino pri tikla temo. Rotterdam: UEA, 1999. 52p. 19cm. € 6,30. Triona rabato ekde tri ekz.



Unuigintaj Nacioj: Venu kun mi! Nane Annan. Trad. A. Löwenstein. Porinfana prezento de nia bunta mondo kaj de la laboro de UN. Ilus. Zagreb: Izvori, 2001. 34p. 21cm. € 4,80. Triona rabato ekde tri ekz.